



# NORDHUNGARIA INFORMO

*Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo  
Miskolc*

Aprilo – Majo - Junio 2011-a

6a jarkolekto nro 68-70

## Enhavo

2011 estas la Internacia Jaro de Arbaroj .....	4
Ŝerco.....	10
Proverboj.....	10
Muzeoandragogio – alinome – Muzea Instruo de Adoltoj.....	10
Jardatrevenoj en 2011 .....	20
2011: Estas Internacia Jaro De La Instruado.....	21
Vilaĝa somerumo .....	22
La 8a de Marto kaj la 22a de aprilo; la Tago De Tero .....	26
Tristaj okazintaĵoj en Japanio.....	26
Tertremoj, cunamo .....	27
Vulkanoj de Japanio .....	28
Leterkesto .....	32
Gratuloj .....	34
Helpo-peto .....	34
TEĴA, post la UK en Kopenhago .....	36
Atenton!.....	37

## **József, Attila: Surarbaron mallum' falis...**

Surarbaron mallum' falis

Ventsusuro ĝin delasis.

Vespert' flugas, noktu' voças,

Malrapide lun' eliĝas.

Tempo pasas, venas nuboj

Rekte super la arbaron.

Tie ili halt-atendas:

Sur la limon benon verŝas.

Ilin luno poste venkas:

En malhelon lumon ĵetas.

Paliĝas tamen sia bril'

La sunforto kurigas ĝin.

Vokas fabriko, birdo

„Restariĝu ĉiu homo!”

Nokto kaj pasinto samas,

Ree estas, la viv' vivas.

(20. februaro 1921)

Esperantigis: s-ino Adri Pásztor

## 2011 estas la Internacia Jaro de Arbaroj

Se niaj karaj legantoj surrigardas mapon de Hungarujo, vidos, ke urbo Miŝkolco situas tiel en la Norda-Mezmontaro proksime de rivero Ŝajó, ke ĝiaj sudaj montodeklivoj etendiĝas jam al la Ebenajo. Jam ekde mia 5a jaraĝo vivante ĉi tie, ekamis mi la montojn, la arbarojn kaj iliajn milojn da mirakloj. Mi ŝatas la molan muskan grundon de arbaroj, sed se ĝi estas roka, eĉ tio ne malbonas. Mi preferas la longtrunkajn arbojn makulajn de sunbrilo trafiltiĝanta inter la arbofoliaro, malhelon de la pinoj, la piece profundan silenton dum kovo de birdoj kaj la birdpepadan arbaron, ties loĝantojn kaj la multspecian floraron de la arbora subvegetaĵo. Bonega afero estas printempe observi ĉe la ekburĝonado la multajn vualecajn verdajn foliojn, ja la foliaro de la diversaj arbotipoj havas aliajn verd kolorajn foliojn kaj aŭtune same ĉiu arbospecifo pompas en aliaj koloroj.

La Organo de UN, post la pasinta jaro (2010 estis Internacia Jaro de la Biodiverseco), nun emfazas la gravecon de la arbaroj, la bezonatecon de mastrumado de la arbora arbo- kaj sovaĝbestaro, kaj de ties konservo per marko okaze de la Internacia Jaro de Arbaro. La 31%-ojn de surfaco de nia planedo kovras arbaroj. La konscian utiligon de arbaroj, la arbar-kulturejoj per la arbarmastrumado faras profita, ja la arbaroj – same kiel oceanoj - transformas oksigeno la karbodioksidon, kaj vivejon certigas al granda parto de la biologia multspecifo trovebla en la mondo. La konstrumaterialo kaj la brulligno same devenas de tie. Terura vidaĵo estas por la arbaron ŝatanta homo la teritorioj de la senarbigadaj arbaroj, kie ankoraŭ el la tre malvasteta arbora grundo oni elturnigadas ankaŭ la radikojn de la arboj, por ke eĉ ne povu ĝermi la vivi sopiranta kreskaĵo. Poste ĉi orfiĝintan teritorion oni ne enplantas per arboj, kaj per tiu fiago oni lasas pereigi ĝin per la natura erozio, ja surterene ne restas arbo, kio bonefike ligu per siaj radikoj la grundon. Bedaŭrinde granda malutilo de la Miŝkolcon ĉirkaŭantaj arbaroj; la plimultiĝo de la senrespondece kaŭzitaj incendioj de la arbaroj kaj la senpermesitaj arbohakadoj. Pripensu, kiel granda damaĝo estas por la arbora vivantaro, kiam oni finas arbohakadon en arbaro post la burĝonado, aŭ kiam la nestojn jam enloĝis la birdidoj kaj de tie surfalas tiuj la teron. Sed ne nur la birdidoj estos damaĝataj dum la arbodehakadoj kaj arbarfajroj. La arbaroj havas tiujn estaĵojn, kiuj vivas nur en kavaj arboj (ekz: la pego), alioj vivas kaj vintrumas en nestoj konstruitaj el arbohastoj sur arbobranĉojn (tia estas ekzemple la sciuro, kiu ne en kavoj kaŝas sin dumvintre kontraŭ al la pli frua miskredo.) La arbaraj kolubredoj sub ŝtonoj, sub trunkoj de arboj, aŭ inter kaj sub ties radikoj katalepsie atendas ensaluton de la printempo.

Al regiono Nord-Hungario apartenas la montoj: Börzsöny, Cserhát, Márta, Bükk, la montaro Zemplena kaj ties Regiondefendaj Distriktoj, Naciaj Parkoj. Tiuj estas ekzemple: la Nacia Parko de montaro Bükk, la Regiondefenda Distrikto de montaro Zemplén, la Karsto de Aggtelek, la hungarlanda parto de la malnova departamento Gömör-Torna ligita al departamento Zemplén: Putnok kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo la pejzaĝo de marĉaj lagoj de vilaĝo Kelemér, la Naturdefenda Distrikto de Lázberc, la angulo de urbo Tokaj kaj rivero Bodrog (kies tuta teritorio estas parto de kulturo de Tokaj-Montosubo: Monda heredaĵo, deklarita de la UNESCO en 2002.)



La akvorezervejo de Lázberc – la bildo estas prezentita per permeso de vilaĝestro sinjoro Denizo Ladislao Lukács; de la retejo: [http://www.szeporszag.hu/main.php?ds\\_clock\\_delta=0&language=hungarian&ds\\_show=indiv&ds\\_noback=yes&varos\\_id=78&modify=38957](http://www.szeporszag.hu/main.php?ds_clock_delta=0&language=hungarian&ds_show=indiv&ds_noback=yes&varos_id=78&modify=38957)

Oni opinias, ke la flaŭroj de montaraj (Börzsöny, Cserhát, Mátra) Borĵonj, Ĉerhat, kaj de Matro pro siaj priplantitaj arbaroj multe kongruas de la montaraj Bükk kaj Zemplén. Ĉar mi pli plurfoje ekskursis en arbaraj pejzaĝoj de departamentoj Borĝod-Abauj-Zemplén kaj de Karsto de Aggtelek, ol en aliaj regionoj de la Norda - Mezmontaro, tial mi prefere parolos nun pri la de mi jam vizititaj teritorioj.

La Nacia Parko de montaro Bükk (Bukkk) apartenas al la unuaj naciaj parkoj de Hungarujo, kiu situas en la Norda-Mezmontaro. Ĝia direktorejo troveblas en urbo Eger. Fondotempo: la 28a de decembro 1976. Ĝia teritorio estas: 43 200 hektaroj. El tiom, la intense defendata teritorio estas: 5 704 hektaroj.



La fungo Bruna Boleto (Xerocomus badius)



Lilaj fungoj Trikolomo nuda (Lepista nuda, Tricholoma nudum)  
[nuda/http://gomba.extra7.hu/index.php?gomba=95](http://gomba.extra7.hu/index.php?gomba=95)

El ĝiaj manĝeblaj fungoj mi konas kaj nutras min per la fungospecioj: Bruna Boleto (Xerocomus badius), nobla boleto (Boletus edulis), la fungon (Boletus edulis), kiujn ni povis

trovi ofte en arbaroj de vilaĝoj Bükkszentkereszt kaj Répáshuta kaj la lilan fungon (Lepista Nuda) enarbore de Hollóstató, krome en ĉirkaŭaĵo de piceoarbaroj de vilaĝo Bükkszentlászló: la fungon Bongusta Rizike (Lactarius Deliciosus).

La montaro Bükk estas membro disponata per terhistoria pasinto malsimila de la aliaj vulkanaj montoj de la Norda-mezmontaro. Ĝia granda parto konsistas el mar-sedimentaĵo devenaj rokaĵoj, ĉefe dolomito kaj kalkoŝtono. Ĝia pli ol 800 metrojn altan alplataĵon krutaj rokklifoj buntas. La **Bél-kő** (roko-Bél) 786 metrojn altas (en preĝejo de la abatejo de vilaĝo Bélapátfalva situanta ĉe ĝia piedo, la volbo de la interna tereno estas barok-epoka), la **Pes-kő** (roko-Peŝ) havas 857 metrajn marnivelan altecon (sur ties vertikalaj kalkŝtonmuroj la rokgrimpantoj sportistoj provadas siajn sciojn), la **Tar-kő** (roko Tar) estas 949 metra. De ili kaj de la pliaj rokoj admirinda elvidebleco etendiĝas al la suda montpiedo.

Pro la cementproduktado ekspluatita kalkoŝtono, la alteco de Roko-Bél malpliigis al 815 metroj. Ekskursante en montaro Bükk, ni povas renkonti la plej grandan bufspecion praindiĝenan en tuta Eŭropo. La juna ido de **Bruna bufo** je hazarda rigardo similas al bruniĝinta granda arbofolio, kion malfacilas rimarki se ni renkontas ĝin en la sekfoliaro. Ĝin mi renkontis kiam kaŝis sin en dehakita arbotrunko en arbaro de ekskursejo Szentlélek. Sed ĝi vivas ankaŭ en arbaroj ĉirkaŭ la turistloko Bánkút, ĉe kaŝejoj de riveretbordaj ŝtonetoj, arbotrunkoj. Ankaŭ **arbarajn kolibrojn** oni povas vidi vagadante kaj en Bükk, kaj sur la karsto de vilaĝo Aggtelek. Ĝi troviĝas en varmaj sunradiaj lokoj, sed preferas ankaŭ la defaliĝadantajn montetmurojn, eĉ ŝtonerarojn. La arbara kolubredo (*Elaphe longissima*) longas 140-160cmojn, flavecbruna, bruna, aŭ oleokolora, en ties plimulto estas senmodela kolubroraso. Mi admiras ĉi bestojn, sed plie mi timas ilin. Kvankam ili povas kaŭzi mordon se hazarde ni surpaŝas ilin en la sekfoliaro, sed ili ne havas venenan **materialon**. Sur niaj montoj de printempo ĝis aŭtuno ĉiam sunbrilaj per ŝanĝema vegetaĵaro kovritaj lokoj ni povas renkonti kun belaj **verdaj lacertoj** sed kaj kun grizkoloraj vivnaskaj lacertoj, kiam ilian kapon suprentenante sunumas, aŭ ĵus kuras por malsoifigi sin al la arbara eta rojo.



Foto: Arbarĉirkaŭita fiŝlago ĉe vilaĝo Harsány. Fotis: s-ino Adri Pásztor

Proksimume 95% -ojn de la Nacia parko de Bükk kovras arbaroj. En Bükk la plej disvastiĝintaj estas la muskakverkaj-kverkaraj arbaroj, kiujn en la pli altaj teritorioj la karpenaj-kverkaj, poste super 600 metroj sekvas la montarregionaj fagarbaroj. La plej interesa loko de la Bükk-a Nacia Parko estas la t.n: **Praarbaro**, kies fagarboj estas 180-200 jaraj. Sur ĝia loko pli ol de 100 jaroj oni ne faras forstkulturajn agadon. En la montaro apud la fagarbaroj ekzistas ankaŭ pinarejoj, kiuj estas senescepte priplantitaj arbaroj. Pliiĝitan defendon ĝuas sur la krutaj, nordaj, rokaj dolomit-kalkŝtonflankoj, sur rubdeklivoj elformiĝintaj, preskaŭ nana, nerektajn (ondsurfaca) arbojn havantaj rokaj fagaroj, kiuj hejmondonas al multaj kreskaĵraraĵoj kaj glaciepoka restaĵspecio. El vidpunkto de nialanda pluekzisto de rokaj fragejoj, kverkejoj de montaro Bükk, elstare gravas ilia savgado. La plej interesa natura spektaklo de Nacia Parko de Bükk estas la provizoraj **karstfontoj**, kiuj je siaj ternivelon eksplodoj allogas la papipilojn, birdojn kaj ankaŭ la malsekecon necesantajn insektojn. Ne raras la birdoj korako, buteo, tatarfalko, akcipitro, rokturdo... en la akvoj la truto. Miaj favoratoj; la ruza belan ruĝpelton havanta vulpo, la ruĝa sciuro, la graciaj cervoj kaj la saĝa apro kun siaj strikaj idoj same estas ĉi tie loĝantaj. /baze de [http://hu.wikipedia.org/wiki/Bükk\\_Nemzeti\\_Park/](http://hu.wikipedia.org/wiki/Bükk_Nemzeti_Park/)

La Nacia Parko de Aggtelek (ANP) estas la kvara nacia parko de Hungarujo, fondita en 1985. Tiu ĉi estas la unua nacia parko nialande, kiu estis fondita nurture por savgadoj de la geologiaj valoroj - la regionaj tersurfacaj karstfenomenoj kaj la famaj gutŝtongrotoj - sed ekzistas sur ĝia teritorio ankaŭ multaj protektitaj kreskaĵoj kaj bestoj. La nacia parko situas sur 170 hektara teritorio en interno de riveroj Ŝajo kaj Hernad, sur la karsto de vilaĝo Aggtelek, sur la hungarlanda parto de la iama Gömör-Torna departamenta-karsto. La teritorio situas sur malaltpontara-montetara nivelo, nur ĝiaj kelklokoj atingas la mezmontaran altecon. Sur tiu ĉi relative malgranda teritorio la flaŭro estas eksterordinare multspeca, rasoriĉa. Tiu dankeblas al la varia ternivelo. La karstaj altplataĵoj, la sudaj deklivoj, la grotoj, la profundaj valfaŭkoj kaj la ekstremaj mikroklimataj dolinkavoj aliajn vivejon certigas al estaĵoj preferantaj ŝanĝemajn vivterenojn. Oni elformis 1327 hektaran arbarrezervejon en la Nacia Parko de Aggtelek. Ĝian teritorion 75%-e falfoliaj arbaroj kovras. Ties plej ofta arbarsocio estas la karpeno-senpedunkla kverkaro (*Quercus petraea-Carpinetum*), en la pli profundaj ravinoj mezmontaraj fagaroj, ravinarbaroj, sur la altplataĵoj kreskas tilio-frakseno rokaj steparbaroj. Sur la pli sudaj, iom pli varmaj lokoj troveblas kun makuloj de sekaj herbtapiŝoj rotaciaj rokherbejoj, kverkospecio (*Quercus pubescens*) Harar-kverkaj arbedarbaroj. (La foli-inverso pro la sur ĝi kreskanta hararo estas helverda.) La plej ofta floro de la karsto estas la Pulsatilo granda (*Pulsatilla grandis*), sed je fino de la Almás-dúlő de Aggtelek (almas-kampvojo) estas trovebla ankaŭ Printempa Adonido.



Pulsatilo granda kaj la Printempa Adonido.

La granda ĉasbestaro de la arbaroj riĉas, ĝiaj ĉefrepresentantoj estas la vulgara cervoj kaj la aproj. Sed jam translokiĝis ĉi tien la lupo kaj la linko. ne raras la buteoj kaj la blankvosta maraglo. En la arbaroj nestas la en Hungarujo rara birdspecio: la bonazio (tetrospecio), krome vivas sur la karsto de Aggtelek ankaŭ lacertoj, kolubrospecioj, sed viperoj jam ne. Sed vivas

tie la bone konata de blazono de la nacia parko; la flavmakulhava salamandro. La karstaj akvoj enhavas pli ol 42 specion da fiŝoj. La ras-nombro de papilioj superas la dumilojn.  
/ Baze de la retejo: [http://hu.wikipedia.org/wiki/Aggteleki\\_Nemzeti\\_Park/](http://hu.wikipedia.org/wiki/Aggteleki_Nemzeti_Park/)



Foto: Sur la „Baradla vojeto por lerni” – Foto de Direktejo de Nacia Parko de Aggtelek  
<http://www.nordtour.hu/info/temak/tanosvenyek/aggtelekikarszt-tanosvenyei.html>

En la Aggtelek-a Almás-dűlő inter 1986-1988 iujare dum Pasko kelktagojn mi pasigis kunfamilie en luita forsisita semajnfina domo, kiu servis ripozejo de familio de iu nia bofrato. Mi ne rememoras jam pri la jaro, nur la eksterordinaran okazintaĵon. Iunokte mi vekigante rimarkis la dormoĉambron kaj la korton plenigitan preskaŭ tutlumon. Rapide mi kuris en la korton kaj mire rimarkis al la ĉielo. Nia domo kuŝis inter du montoj en malvasta valo, la slovakaj landlimo ne malproksimis de ni. La valon defendis triflanke arbaroj, valfine kuris la landvojo kondukante al la vilaĝo situante al unu kilometro. La dumtaga lumo daŭris plurajn minutojn, poste traformiĝis verdecgriza, poste malaperiĝante al aŭrora grizeco, antaŭ ol la lumstrikto plenplenigita en tuta larĝeco la valon estus forpasinta en direkton de Jósvalfő, al la monta aliflanko. Post forpaso de la akra lumo denove la nokta malhelilo falis sur monton-valon. El inter la parencoj iu pensis pri eksterplanedanoj (UFO-j) pro la granda brileco, mi pensis pri meteorito, (tamen dubis ĉar ties lumon mi konis lumvosto, kaj ne pri vastastrike sur la ĉielo disvastiĝanta lumo). Alitage inter la vilaĝanoj iuj supozis, ke en la landlimzono certe la slovakaj limgardistoj zononlumigis per iu forta lumo. Sed la limgardistoj preterlasante la barilon de nia parcelo informis nin, ke ni povis esti atestantoj de unu lumspektaklo, natura fenomeno de Nordaj Lumoj, en Hungarujo tre malofte videbla.

La teritorio de la Regionprotektata Distrikto de montaro Zemplén havas 26 496 hektarojn, el kio intense protektata estas 2395 hektaroj. Tio apartenas al direktado de Nacia Parko de Aggtelek. La vulkandevena montaro Zemplén estas varia regiono konsistanta el vulkanoj mildiĝantaj je diversgrandaj konusoj, kaj el sedimentaj rokaĵoj kovritaj pli malaltaj montetdorsoj. La Pejzaĝdefenda Distrikto estis elformigita sur du ne ĝenataj kaj pli bone ĉirkaŭlimigebla parto de la tri partoj de la montaro. La pliaj geologiaj interesaĵoj de la montaro estas la plurloke ekzistantaj grandampleksaj ŝtonfluaĵoj, kiuj estiĝis pere de la miljaraj pecetiĝadoj de la andezito, kaj tiuj formiĝas ankaŭ nun. La vizitanto plurloke povas renkonti ŝtonskulptaĵojn” estigante ilin la vento kaj pluvo, el kiuj la plej belaj ricevis nomon. Inter ili estas ekzemple, la roko-Rákóczi. La montaro Zemplén geologie apartenas al la interna rando de norda montoĉenoj de Karpatoj. Pri la Karpatoj memorigas la krutaj montospinoj, la profundaj ravinformaj valoj, kaj laŭ la iama vulkana agado estiĝintaj konusvicoj same, kiel la ĝis nun grandeg-ampleksa, kunapartenanta – preskaŭ 90%-an kovritecon certigantaj arbaroj. Sur multaj lokoj de la montaro relative grandajn teritoriojn okupas la plantitaj regionfremdaj pinarbaroj. Bonsentas sin tie la cervo, apro, leporo, sovaĝkato, marteso, kaj la melo. Bazo de la densa vegetaĵo estas la Karpat-simila malvarmeta precipitaĵa klimato. En la valsoboj ankaŭ plurloke oni povas renkonti marĉajn kampojn kun dense kreskantaj marĉaj kreskaĵoj, kies mortintaj partoj deleviĝas el la marĉo simile al etaj montetoj. Inter ili povas

esti torfa koto aŭ malprofunda senflua akvo. Ĝia plantaro estas eksterordinare interesa kaj varia. Krome ni povas renkonti la jam menciitanjn kampojn buntatajn per makuloj de alno-marĉoj, belegaj betularbaretaj-fagaj miksaĵbaroj, sfagnomarĉoj.



Fotoj: Vidaĵoj de la Muskaj-lagoj de Kelemér

<http://www.google.hu/search?client=opera&rls=hu&q=Kelem%C3%A9ri+mohos+tavak+k%C3%A9p&sourceid=opera&ie=utf-8&oe=utf-8&channel=suggest/>

La Kelemér-apuda monto Piroška estas sur argilan subgrundon konstruiĝinta sabla, ŝtonera tavolo havanta acidan reagon. La karakteriza arbarsocio: estas la karpena-kverka teritorio. - per sia tre bone fermiĝanta foliarnivelo ne permesas varmiĝi la grundsurfaco, kaj antaŭhelpas la elformiĝon de la malvarmeta, vaporplena aertavolo. Ankaŭ la kreiĝon de la kune estantaj muskaj lagoj-Granda kaj Malgranda per sia 5 hektara teritorio, faris ebla la argila grundo, ĉar dum longaj pluvadoj ofte ekglitiĝas la supra grundtavolo, fermiĝante tiel la intermontajn pli malgrandajn valojn, riveretbasenojn. Same estiĝis ankaŭ la basenoj de la du lagoj – la pli granda iam antaŭ de 10 mil jaroj post la glaciepoko, la pli malgranda ĉ. de kvinmil jaroj. La trihektara Nagymohoš (Grandmuska) estas en pli progresanta stato de la lagevoluo: la torfotavolo de la ŝveliĝant-marĉo estas jam pli ol tri metrojn dika, jam tute ne havas malfermitan akvosurfaco, ankaŭ ĝia surfaco estas pli seka. Pli bone enkreskis ĝin la betula-salika randosocio, ol la pli malgrandan, per malfermita akvorando ĉirkaŭzonitan ankoraŭ Grandmarĉon lulantan lagon. Bedaŭrine, pli frue oni elprovis pri ilia drenado. La sfagnomarĉojn – kaze de la Nagymohoš (lago-Grandmuska) pli larĝa-, kaze de la Kišmohoš (lago Malgrandmuska) pli malvasta – marĉozono ĉirkaŭas, per kano, tifao, kanaagrostido, sur la pli sekaj partoj betulejo kaj salikarbejo. Al la duono de la marĉoj ĉi rando transformiĝas en tufmuskan salikan- kaj tufmuskan kanan socion, poste en la tre valoran erioforan tufmuskan ŝvelmarĉon. Sur teritorio de la marĉo estas malpermesata eniri ne nur el kialo naturprotektata, sed la enpremiĝanta marĉo povas esti ankaŭ vivdanĝera! Sur la okcidenta parto de la altaĵeno de Putnok situantaj per arbaroj ĉirkaŭitaj marĉoj, dum la pasintaj jardekoj gravaj ŝanĝoj okazis en vivoj de marĉoj. La malfermita akvospegulo preskaŭ tute malaperis, dum kio la lignecŝalma vegetaĵaro iĝis pli evoluinta, la marĉozono estiĝis pli disvatiĝinta.

La direktorejo de Nacia Parko de Aggtelek; kiel naturprotektato havas taskon por gardsavi la naturdefendajn valorojn, konservado, restauro kaj prezento. Tiuokaze ĝi certigas la konservon de la naturdefendaj valoroj, estigis en Kelemér en la renovigita kamparana domo: en la Mohoš-ház (Muska-domo) la konstantan ekspozicion prezentinta la marĉojn. /Laŭ tekstoj de Csaba Bartha RS kaj la hungarlingva retejo:

<http://www.foek.hu/zsibongo/termve/tt/kelemer.htm/>

SinJORINO Adri Pásztor

## Ŝerco

### Lerteco

Du amikoj promenadas en la arbaro.

- Ĉu vi vidas tiun grandegan arbon? Imagu, pasintjare mi surgrimpis ĝin dum du minutoj.
- Ne diru! Kaj ĉu vidis iu tion?
- Jes, unu urso.

/Ladislao Pásztor/

## Proverboj

De la arbo ne videblas la arbaro. Arbaro aŭdas, kampo vidas. Arbo krakanta, venton ne timas.

/El Zamenhofa Proverbaro Esperanta/

## Muzeoandragio – alinome – Muzea Instruo de Adoltoj

Elektita tekstaro de la Unua Muzeo-andragogia Konferenco en Miskolc - Szentendre 2010

La hungarlingvan tekstaron kompilis: Mihály Kurta – Maria Pató

### :Recenzo:

Sinjoro Robert Fekete planis la kovrilpaĝon de la supre menciit-titola, 16 x 21 cm grandan mezuron havanta libro, prezentita en Miŝkolco la 4-an de Junio 2010-a. La kovrilpaĝon bildo ornamas. Surbilde infanoj montriĝas kun figuroj de geviroj. La infanoj povas esti familianoj aŭ lernantoj, La viro kaj virino iliaj gepatroj aŭ iliaj geinstruistoj. Unufoje ni povas rigardi la futuran simbolon de la senmanka familio, duafoje kiel simbolon de la muzeon vizitantaj gelernantoj gvidataj de geinstruistoj. La figuroj kune kun la malantaŭa klarblua ĉielo faras plaĉema la aperon de la libro.

La originala titolo de la eldonaĵo estas: Muzeumandragógia / Muzea Instruo de Adoltoj. La libro kiu estas elekto de prelegoj, pretiĝis per subtenoj de la Instrua kaj Kleriga Ministerio, La Muzea Instrua kaj Kleriga Centro, krome la metiejo TIMPNET.

La libron eldonis: la Direktorejo de la B-A-Z departamentaj Muzeoj en Miŝkolco kaj la Subĉiela Etnografia Muzeo en Szentendre.

Respondeca eldonisto estis: departamenta muzeo-direktoro Ladislao Veress, ĉefdirektoro Nikolao Cséri.

Vastan temrondon havanta la eldonaĵo estas bone verkita, bone strukturita verko. Ĝi pretiĝis en la Presezuzino de la „Kapitalis KFT” en urbo Debrecen, respondeca eldonisto estis: Jozefo Kapusi.

La libro: Muzea Instruo de Adoltoj I., enhavas prelegojn prezentitajn dum la Unua Muzeoandragogia Konferenco /en Muzeo de la Hungara Lingvo en Széchalom: 11-12. Majo. 2009/ de 30 prelegantoj, krom la ferma parolo de sinjoro doktoro Jozefo Szabó. Ĉi verko estas senekzempla muzea faklibro en Eŭropo. La seriofarantoj estis: Maria Káldy – Jozefo Kriston Vizy, kaj Mikelo Kurta – Jozefo Szabó.

Konigon pri la supre menciitindika faklibro vi povos legi laŭ la libra vicordo de prelegoj. La kurzivaj tekstoj: citaĵoj estas el la eldonaĵo, la normalliteraj partoj enhavas la opiniojn, tekstoaldonaĵojn de la recenzon pretiginta persono.

Pluraj prelegantoj parolis pri funkcioj de sur siaj agadteritorioj laborantaj muzeoj, ĉeflernejoj. Tial, pri tiuj mi faris apartan konigon laŭ la titolo: Muzeoj de Hungario, funkciantaj laŭ la Muzea Instruado de Plenkreskuloj.

/1/ Sinjoro Péter Szamosvölgyi – urbestro de Sátoraljaujhely - :konigas la legantojn pri temo de la libro: „Bonan kaj bone! Tio estas ĉi tie la granda sekreto.....” citis la Petro Szamosvölgyi vortojn de Ferenc Kazinczy. La preleganto laŭ ekzemplo de la citita literaturisto same ĉion klopodas fari siaterene por la muzeo. Menciis la preleganto, „ke antaŭ multaj jaroj naskiĝis la ideo de la muzea instruo de plenkreskulo. La vorto andragogio estas greka vorto, kies signifo estas: edukado, instruo de plenkreskuloj. La muzeoandragogio signifas la muzeonivelan edukon, instruon de plenkreskuloj.”

/2/ Ĉefnotario de departamento Borsod-Abaúj-Zemplén: Doktoro János Kovács komencis saluti la partoprenantojn de la konferenco, citante ideon de la franca pentroartisto Auguste Renour: „.....Se inter miliono da homoj troviĝas eĉ unu por kiu signifas ion, tiam la ekzisto de muzeo jam havas racion.” D-ro Johano Kovács menciis, ke pere de la muzea instruo de plenkreskuloj, „la muzeo iĝas pli malfermata al la vasta publiko kaj de tio ĝi kontribuas ne nur al altigo de nivelo de la averaĝa erudicio, sed ankaŭ al formado de individuo de la klerita persono.”.....”Per tiu ĉi muzea agado la muzeoj celas atingi fiksan financon bazon donantan budĝetan subvencion. Ĉitempe la celoj, la pretendoj devenas el landaj intereso, la financadoj estus plenumitaj plej multe el pruntoj, vendo de nemoveblaĵoj, enspezoj de ne la fakojn karakterizaj agadoj. Demando estas: ĝis kiam estas rezervebla ĉi stato kaj kiam signifos gravan fakan malfajnojn la po foja tuta manko de la financaj kondiĉoj?”

/3/ Sinjorino Annamaria Vigh prelegis pri la „Pensoj pri la estont-bildo de Muzeoj”

„ Niatage ni vidas tion, ke celo de la muzeo-vizitanto, la plej grava vizitanto-atendo estas la akiro de konoj kaj tio, ke ni povu servi la kontentigon de la scivolemo pri la nekonataĵoj. En tiu informacio interpreta rolo la muzeoj suprentaksiĝis. Ofte spertebla estas, ke en la malgrandaj setlejoj la vizitniveloj de la regionaj domoj, memordomoj, lokhistoriaj kolektaĵoj

estas tre altaj. En ties kazoj estiĝas manprenebla la principo de la socia utileco. Ĉi maniere evoluas kaj formiĝas ĉiam pli interesa la loka kulturo, pro kio unu ellevita celo estas la evoluigo de la muzeaj ekspoziciejoj kaj la sistema evoluigo de la muzeaj kolektaĵoj, la gardo de lokaj valoroj en intereso de fortigo de la loka identeco....La disvolviga procezo komenciĝis inter 2000 kaj 2009 kadre de la programo „Muzeoj por ĉiuj”. Apogiĝante al malvastaj financaj cirkonstancoj oni decidis tiun celsistemon, kiu estis plenumigita per engaĝo de Eŭrop-uniaj financaj fontoj. Konforme al tio, oni devas pli efike devas plupasi, grandigite la la instruelan utiligon de la artaĵstoko. „Mia opinio, al tiuj laboroj vastronda socia koncentro bezonatas. Tiuprocezo decidan rolon ricevos ĉiuj, kiuj ankaŭ en la ekzerco inklinas alproprigi la ideon de la dum vivlongo tendenca lernado. La vivlonge tendenca lernado estas la plej grava demando de la senco de la homa vivo. Tio ĉi signifas, ke kiu kolektas konojn ankaŭ en la malfrua etapo de sia vivo, tiu povas akordiĝi ankaŭ tiam al la pretendoj de sia ĉirkaŭaĵo kaj tiel povas senti sin ĉiam utila.

/4/ Sinjoro Mihály Kurta: Muzea instruo de plenkreskuloj kaj la plej grandskala stato de Muzea-Konscienco /Muzea-meditacio/. La novigaj klopodoj en la Muzea-kulturointerpreto.

„La simptomojn, procezojn de la hungara socio, la Eŭrop-unia komunumo kaj la nin ĉirkaŭanta mondo analizenda el vidpunkto de la muzea instruado de plenkreskuloj, ni tiris tiujn konkludojn, kiuj povas signi novajn direktojn al nia muzea kulturointerpreta teorio kaj muzea ag-ekzerco.

La ĝeneralajn konkludojn jene mi resumas:

1. La krizo de nia patrujo, la Eŭrop-unia komunumo, la globala mondo estas ne nur financa kaj ekonomia, sed ni kontraŭstaras ankaŭ en la homa mondo longdistance valida kultura, kolektiva, morala krizo. La financa, ekonomia krizo estas nur la sekvo de la kultura, komunuma kaj morala krizo.

2. Baze de niaj observadoj ni spertis, ke runde de la plenkreskuloj disvastiĝantaj modernaj procezoj-igantaj stultaj la homojn – montras plialtiĝan tendencon en la mondo. La simptomoj ne interrilatas kun la analfabeteco, plie havas kontakton kun tutmondecigo, la tutmezuraj agadoj de la modernigo, kun krizo de la modernismo, kontraŭ la alia homo gradiĝanta krueleco de la homo klopodanta al aŭtonomio, potenco, parte interrilatas per la eksplodsimila progreso de la inform-komunikado, la giganta kvanto de la per mondreto komunikitaj informoj.”

Laŭ sinjoro Kurta ĉi malsaĝiga agadsistemo evidentiĝas en tio, ke la plenkreskuloj prefere elektas la retajn ne ĉiam tutprecizajn, sed facile, rapide akireblajn datumojn anstataŭ ĉi plej malmodernaj lernadmetodoj (per libroj, prelegoj, kursoj) atingiblaj valoraj indikoj. Multkaze oni estiĝas tro liberaj, maldece kondukantaj, senpripensaj koncerne siajn agojn kaj al siaj homfratoj, proksimuloj. „Ĉi metodo estas bedaŭrinde sindetruada konduto. Laŭ la diritaj la temo de la muzea kulturotransdono dum muzea instruo de adoltoj estas komunumon generanta celo.

La muzea sistemo de instruado de adoltoj (muzeo-andragio) esploras la eblecojn de la muzeo, muzeokarakteraj institucioj, civilaj kolektivoj, la organizoj taksitaj per protekto, gardo pri la kultura heredaĵo, la agadeblecojn, kondiĉojn ĝi ekzamenas, krome klopodas malkaŝi tiujn egalajn, kiuj interoficiaj, aŭ eksteroficiaj muzeaj kadroj povas esti pli influaj por la plenkreskaj individuoj, komunumoj de plenkreskuloj, la lernadajn memklerigajn, la personevoluigajn rezultojn etendiĝantajn al ĉiuj vivtenoj. Dum la muzeoandragia konferenco la muzeologoj, la muzeaj kulturoperantoj kun la esploristoj de universitatoj, profesoroj povis komune disputi pri la duobla instruado, kies esenco estas, ke la konoalproprigo konstruiĝanta sur la okcidenta civilizacio certigas universalvalidan scion. En la hungara kulturo, en la muzeologio la estonteco de la muzea instruado de plenkreskuloj tiu privedita: ĉu estos scienco-plimultigantuloj havantaj intelektan kuraĝon.”

Same estas celo por helpi la plenkreskulojn, la plenkreskan komunumon en prizorgita loko de muzeo, por ke tiu povu ekzerci la vivlongan lernadon, krome, ke la muzea intereso, la publiko povu ekkoni ties metodojn. La vivlonga lernado ne estas nova afero ĉe ni. Ja, laŭ la hungara onidiro: ”Ankaŭ la bona pastro lernas ĝis sia morto.” La diferenco estas tamen, ke nun la vivlonga lernado devas etendiĝi ne nur al kleruloj, sed al tuto de socio. Laŭ ties esenco: kiu kolektas konojn ankaŭ en la malfrua periodo de sia vivo, tiu povas utili ĉiam kaj povas senti sin sukcesa. „En landoj de Eŭropo – eble malpli en Hungario – ĉiutage akriĝas la situacio inter kulturo de la evolulandaro kaj la eŭropa. Tial niatage la plia celo de la muzeoj estas por helpi la plenkreskulojn por ekkoni la multtavolan scion de la homaro, la instruojn de la ankaŭ aliajn mondkonceptojn spegulantajn aliaj kulturoj. Laŭ la 1997. jara CXL. leĝo 4. parto 2. ĉapitro punkto C: ”konigo de la valoroj de la kulturoj universala, nacia, etnika kaj alia minoritata, la interkompreniĝo, la antaŭhelpo de alprenado, la prizorgo de kulturo de festoj estas taskoj de la loka publika kleriĝo. La okupiĝo pri la pasinto, nun kaj estonteco de la muzeoj rigardeblas mondskala, kiu estas tute novbakita fenomeno, ja pli frue la muzeoj fokusigis al la pasintatempa ekzameno, esploroj de la kultura heredaĵo. Inter la nialandaj ekzemploj altrovantaj pozitivajn sociajn efikojn ni mencias la grand-spektaklojn. La Longa Nokto de Muzeoj la Aŭtuna Festivalo de Muzeoj, Muzea Majfesto – nombraj ekspozicioj altiras multegajn vizitantojn. La ariĝintaj scioj, konoj, spertoj en la muzeoj povas simili al neniam alia kultura sistemo. El kriterioj de la totalada muzea filozofado mi ellevas ekzemple: la etendiĝon de la muzea libera kleriĝo al la talento-prizorgo, al penado de vivlonga lernado de infanoj kaj plenkreskuloj, evoluigo de la vastaronda servantokapablo de la muzeo sur tereno de turismo, la muzeo kiel instruanto pere de amuziganta instruado estiĝu travivaĵkarakteron donanta instituto.” „La muzea publika kleriĝo laŭ la leĝo; muzeokarakteraj kreaĵoj, signifas la procezon de la perado kaj enprenado, dum kio la muzeokarakteraj organizacioj, la muzeaj civilkomunumoj kreas eksterlernejan kadron al la alproprigo fare de la homoj ke esencon de la kultura heredaĵo, la homoj ankaŭ meminstru-maniere – sendepende de la aĝaj proprecoj – povu alproprigi kaj enpreni. Ĉiam baza tasko estis de la muzeoj: por kolekti la objektajn memoraĵojn, prilabori registri gardi kaj prezenti ilin. Fino de la 20-a jc. laŭ eksplodajn ŝanĝiĝojn evoluigis en la muzea sfero. Sur la internaciaj terenoj laŭorde oni disputas pri estonteco de la muzeoj. la instrua sistemo de Eŭropa Unio estas la tn., procezo sistemo, kies bazo konstruiĝas sur la tradicisistemo de la okcidenta civilizacio, sed ankaŭ tio veras, ke ĉi tio ne signifas veran scion en mondo de la plurpolusa civilizacio. La scioj akiritaj

en aliaj civilizacioj kulturoj estas aliaj, ol kiujn la enmigrintoj povas trovi en Eŭropo, en Hungarujo.” „En Hungarujo konsiderindas etnaj minoritatoj la: Bulgaraj, Ciganaj, Grekaj, Kroataj, Polaj, Germanaj, Armeniaj, Rumanoj, Serbaj, Slovakoj, Slovenoj kaj la Ukrainaj popolgrupoj. Geografie ili vivas sporade, ĝenerale ankaŭ en iliaj loĝlokoj etnon kreante vivas la gentaj, aŭ etnaj grupoj kaj ili diferencas unu de la alia konvene al la poplecaj proprecoj. Situacio de la Ciganoj estas individua, kontraŭ la aliaj etnoj, ĉar ili ne havas patrinlandon kiu povus internacivele reprezenti iliajn interesojn. Tiel la situacion de Ciganoj severigas la mondskala perforteco spertebla kontraŭ ili. Inter la enmigrintaj etnoj pligrandiĝas la nombro ne nur de la migrintoj kaj rifuĝantoj, sed ankaŭ de etnaj grupoj, kies veko de intereso dependas de la ekonomio, vojaĝo, turismo. En Hungario pligrandiĝas la proporcio de la Ĉinoj, Arabojn Vietnamoj ks., pro tio gravas la temrondo de la identiĝo. La identeco emfazas en prezento, monstro de la loka altranga rolado antaŭ la publiko, reprezento de la lokaj valoroj. La kulturo inter landoj de la Eŭropa Unio estas enlandaj aferoj, sed la interpopolan dialogon, la evoluigon de komunumoj, emfaze subtenas la uniaj forumoj. La muzeoj tial klopodas al la traeŭropaktaj kontaktoj, ĉar ili analizas la manifestiĝojn de konfliktoj de etnaj, kulturaj, religiaj civilizacioj kaj volas helpdoni, ke ilia publiko partoprenante en universvaloraj lernadaj procezoj povu ompreni apud la okcidenta kulturo ankaŭ la tradicisistemojn de aliaj kulturoj, religioj. Kaze de la kultura diverseco la samaj modernigadaj fenomenoj danĝerigas eĉ kondamnas al formorto la malgrandajn ligvojn, kiuj same danĝerigas la faŭnon kaj flaŭron. Tial la savo de malgrandaj popoloj malgrandaj lingvoj gravas ĵus tiome, kiel de la faŭno kaj flaŭro.

La medito estas tia procezo, kies celo estas la senpera atingo, eksperto de la plialtnivela stato de konscio. Signifo de la muzea medito estas: la nociaj elementoj de kulturo estas tiuj valoroj, religioj, lingvoj, sciencoj kaj artoj, tradicioj, institucioj kaj vivmanieroj – tien enkomprenante ankaŭ la financajn kaj spiritajn kreaĵojn – per kiuj unu persono aŭ grupo esprimas sin, realiĝas kaj evoluigatas. En Hungarujo la muzeomeditajn procedojn apud la cigantemo kaj alietnoj la muzea ekzerco etendigas al la enmigrintaj kaj la ĉi tie vivantaj ĉiuj etnoj, al la defioj multkulturaj, ja tiuj estas samtempe ankaŭ Eŭropa kaj naciaj defioj, kiuj inspiras la muzeojn al aŭtentikaj respondodonoj. Ekde la 1970-aj jaroj en nocio de la kulturo enapartenas ĉiu formo de la amasinformato – ankaŭ la „informada kulturo”, nome tiucele, ke por ĉiu certigita estu la ebleco de propra elekto sur tero de libereco, kaj la respekto de homaj rajtoj.

#### /5/ Sinjoro Mihály Sári – sinjorino Dalma Lilla Dominek: Lernejo en la Muzeo

Dum esploro finita al la transpreno de la novaj Eŭropaj penadoj, du muzeojn kunsimiligis s-ro Mikelo Sári; la Muzeon British (Londono) kaj la Muzeon Belartan en Budapeŝto. Celo de la esploro estis ties konstato, kiuj elementoj estas komunaj kaj kiuj diferencas en funkcioj de la du landaj muzeoj.”Ni povas vidi, ke la diferencoj estas: en la organizaj kvantoj de la programoj. En la fremdajn kulturojn (Ĉina, Araba, Hinduja, Afrika...) pli da enrigardeblecoj donas la Muzeo British kaj karakteriza estas la organiznivela teno de la konstantaj anglaj lingvokursoj por ke la nebrituloj pere de tiuj pli bone povu ekkoni la prezentitaĵojn. Sed en la Belarta Muzeo pli multas la infanprogramoj, kaj ties plimulto ligiĝas al la Eŭropa kulturo.” Miaopinie nia Belarta Muzeo devas plimultigi la prelegojn, prezentajn pri la Eŭrop-fremdaj, jam menciitaj ekstereŭropaj landaj kulturoj, ĉar el tiuj ankaŭ Hungarujo havas multajn

enmigrantojn. Sed krome la Belarta Muzeo devas organizi hungarlingvaj lingvokursojn plie ol anglajn, ja nia patrinlingvo-landlingvo ne la angla, sed la hungara estas, ni estas Hungaroj kaj ne Britoj. Anglajn lingvaj kursojn gvidi grandnombre en Anglio estas evidenta, ja Anglio estas mondpotenca ŝtato. Sciuj la enmigrantoj se ili volas vivi kontakti la indiĝenan loĝantaron nialande, ili devas bone koni la hungaran lingvon kaj kulturon, al la kontaktiĝoj kun Hungaroj ne la propran lingvon aŭ la anglan apliku! Ne forgesu, ke lingvo de Britoj perforte konkeras tutmonde! Per la hungara lingvoscio ili povos ekkoni la sencojn de hungarlingvaj tekstoj de niaj muzeoj kaj de aliaj lokoj. Ankoraŭ iom pri la de mi vizititaj hungaraj muzeoj: ili havas malmultajn sciigojn, broŝurojn reklamcele pri siaj ekspozicioj. Ekzemple en Tiszafüred oni vendas prospektojn eldonitajn ankoraŭ en 1991. Ni devas scii, ke la Muzeo „Kiss Pál” havas ĉefe sian etnografian ekspozicion ekde multjare neŝanĝitan. La prospekto eldonita en 1991 ankaŭ nun validas. Sed se tamen okazas iom da ŝanĝo, pri tiu informas nin la kasistino de la muzeo. Laŭ mi pli vastaronde devus reklami kaj vendi iliajn prospektojn en intereso de la pli baldaŭa reprinto. La prospekto eldonita en 2011 pli taŭgas ol la 1991 jara, ĉe vizito de granda eksterlanda grupo.

/6/ Sinjoro Csaba Éles: Belaj Vortoj, Profundaj Ideoj Por la Hungara Muzea Rigardo

„Je respekto de pasinto, aktiveco de la nuno, la kredo je la estonto baziĝas la societo, la regno kaj la tuta homaro” – citis s-ro Ĉaba Éleŝ vortojn de (hungara literaturhistorikisto, prozverkisto...) Paŭlo Gyulai, poste li prezentis pensojn de elstaruloj de la 19. jc-a hungara reformepoko: Mihály Vörösmarty, István Séchenyi, Lajos Kossuth, Sándor Petőfi. Ties esenco estas, ke por flegi la nacian memoron, oni devas krei manpreneblajn elementojn. Ekzemple skulptaĵojn, memorĉambrojn...”Sed povas esti nacia memorejo ankaŭ ia fortikaĵruino, batalkampoj. Tiujn oni devas provizi per memorkolono, monumento por pilgrimi tien.” Tiaj histori-memorlokoj estas niaregione ekzemple: la memorparko kreita je memoro de la (1241. jara mongolinvida) granda batalo ĉe setlejo Muhi, fortikaĵoj en Norda-Hungarujo ruinigitaj de Habsburg-reĝimo, sinagogoj en urbo Tokaj kaj vilaĝo Mád. El inter la literaturaj memorlokoj mi mencias la memorĉambrojn de (poeto) Mihály Tompa en vilaĝo Kelemér, de (la ankaŭ esperantlinve verkanta, redaktoro, ĵurnalisto) Mihály Gergely en Varbó kaj je estimo de la du naskitoj: (verkisto) Pál Jászai kaj (la esperantista lingvisto, poeto, arta tradukisto kuracistprofesoro) d-ro Kálmán Kalocsay en urbo Abaujszántó. La menciitaj memorlokoj bone plenumas siajn rolojn.

/7/ Zsuzsa (Suzana) Koncz: Defioj de la Muzea Instruo Por Adoltoj en la Unuiĝintaj Ŝtatoj Amerikaj

„La amerikaj muzeoj determinas pri sia plej grava misio, en plenumo de la instrua funkcio. Al tiu aludas ankaŭ tiu fakto, ke al la klerigo ili elspezas ĉiujare pli ol 18 milionojn da dolaroj. Ankaŭ tiu fakto aludas al populareco de muzeoj, ke laŭ la statistikoj inter la someraj programoj de la familioj unuloke staras la vizito de muzeoj. La amerikaj indianoj povas ekkoni sian kulturon el materialoj de la kolektitaj ekspozicioj, kaj tio ĉi gravas ankaŭ tial, ĉar jam grandparte pereigis ties parolaj aŭ skribaj fontoj. Sed apud la muzea ekspozicia gvidado elformiĝis ankaŭ la prelegoj, diskutadoj, Galeriaj-paroladoj, eĉ ankaŭ la internetaj kaj poŝtelefono-informacioj.” La fluigo de informoj kaj sciigo de la novaĵoj devas iĝi gravaj lokoj

de la atentovejoj de la muzeaj hejmpaĝoj, prospektoj. Tiujn ĉi samajn vojojn sekvi fare de Hungarujo, estas proponata ankaŭ de la Okcident-Eŭropaj ŝtatoj. La supre aperanta maniero, la muzeaj plenkreskulojn klerigaj programoj donas utilajn tempopasigojn ne nur al la gemezaĝuloj, sed ili gravas ankaŭ en edukado de la idoj, kaj en evoluigo de ilia mondkoncepto.

/8/ SinJORINO Erika Juhász: De Instruo de la Muzea Fronta Personaro ĝis la Muzeoandragogia Klerigo. En ĉi tiu prelego la prelegantino elvolvis la rolon de la nunaj modernaj muzeoj kaj analizas montrante la nun sekvendajn novajn vojojn, kiuj povas konduki ne nur al konserviĝo, se dal la pluevoluo, kaj prospero de muzeoj. „Gravas mencii ĉi tie, ke pro la: Vizitantoamikaj-muzeoj, Muzeoj por ĉiuj – programoj realiĝas en la „Alfa-programo” de la Kleriga kaj Kultura Ministerio. Ties celprogramo estas, ke kun la vizitantoj primare renkontiĝanta tielnomata fronta-personaro, do la: halo-gardistoj, kasistoj, gebiletistoj, kaj la sekurgardistoj povos servi primare kiel celpunktoj de la instruoj, enprenante ankaŭ la ekspozicio-gvidantojn, por ke je demandoj de la muzeovizitantoj jam ili povu doni la unuajn informojn. Esence ĉi instruon la muzeoj povas realigi per trejnadoj, interna pluperfektig-kursa sistemo, tiel ankaŭ kadre de la akreditaj instruoj de plenkreskuloj. Tiu plenkreskulgrada pluklerigo povas ligiĝi ankaŭ al diplomo. Ankaŭ la cirkonstancojn de la enira ekzameno donas la petanta supergrade instruanta intitucio.” Tiu ĉi klerigo manke de la cirkonstancoj bedaŭrinde en Miŝkolco ne ekzistas, nur en la Scienca Universitato en urbo Debrecen okazas tiudirekta fakinstruado.

/9/ SinJoro József Szabó: Novaj Defioj de la Muzeoj: Muzea Instruo de Plenkreskuloj

En ĉi tiu prelego d-ro Jozefo Szabó prezentas kaj analizas rolon de muzeoj, montrante la novajn vojojn kiuj povas konduki al la porestanta ekzisto, pluevoluo, floriĝo de muzeoj. La interpreto de la programo „dum la tuta vivlongo daŭra lernado” /”lifelong-learning”/ atingis sian nunan version je antaŭo de la 21-a jarcento. La akceliĝantaj ŝanĝiĝoj, tiel same la akiro de la kvalifikiteco bezonata al laborkondiĉoj modifiĝintaj pro la evoluoj teknika kaj teknologia, trafis fokuson. En tiu ĉi procezo la vizitantoj povas havi tiujn informojn, kiuj helpas la orientiĝon en nia rapide ŝanĝiĝanta mondo, ian apogilon kaj bone konturiĝeblan fonon signifas por ĉiu aĝogrupa. tial estas bone elektita tiu ĉi funkcio, ja la muzeoj disponas pri tiu rimedaro, kiu forte povas gradigi la efikecojn de transdono kaj enlaso de la informoj. Parte de la muzeoj unu kaŭzo estas la kulturo-interpreto, la alia estas, ke la muzeoj apartenantaj al kategorio de publikhavaĵoj, estas financataj nur tre malaltmezure. Se la muzeoj volas pluevolui, sekve ili devas iĝi profitonproduktantaj, instruantaj, amuziĝantaj institucioj, do ili devas produkti la financajn havaĵojn por si mem. „La Eŭropa Unio atendas tiun de ni, do ni devas surprizi ĉi novan vojon.”

/10/ Judit Lakó sinJORINO Herpai: Gerontologiaj Aldonaĵoj al Helpe de la Gerontologiaj kaj Muzeo-gerontologiaj Agadoj.

„La gerontologio estas scienco okupiĝanta pri la maljuneco kaj procezo de la maljuniĝo. Celoj kaj taskoj de la gerontologio estas: por esplori, ekkoni procezojn de la homa maljuniĝo, trovi tiujn faktorojn, kiuj rapidigas, maéakcelas, kaj per la moderigo ili plilongigas la aktivan periodon de la homa vivo. Ĉi tio ankaŭ tial gravas, ĉar niatage en Hungarujo ĉiu 5. homo estas super 60 jaro. Ĉi tiu scienco okupiĝas ankaŭ per demandoj de la maljunaĝa lernado. Pro tio la

muzeoj apud klerigo de adoltoj (andragogio) difinis kiel celon; ankaŭ instruon de la maljunaj homoj. Laŭ la distribuo de la Tutmonda Sanitarafera Instituto (WHO) la provizora aĝo estas 45-60 jaraĝo, periodo de la maljuniĝado estas 60-75 jaraĝo, la maljuneco 75-90 jaraĝo, la kaduka maljunega aĝo 90-100 jaroj kaj la vivantojn super 100 jaroj ni nomas”Tre maljunegaĝaj”(„Metuŝelaĥ - aĝaj”). Mi pensas bona imago estas la okupiĝo kun la maljunaj homoj, ja ĉe la maljunaj kaj sole vivantaj homoj gravan danĝeron kaŭzas la soleciĝo, la fizika kaj anima izoliteciĝo.” La muzeoj povas helpandoni al kreo de komunikadaj eblecoj okazantaj kun ili, ankaŭ al renkontoj kun samaĝaj kaj aliaĝaj homoj, por ke per plimultiĝo de la sukcesĝo ilia vivemo, energio povu reviviĝi. Ja ni scias el propraj spertoj, ke ankaŭ al la maljunuloj multe signifas la sindisvolvado, la sukceso antaŭ la komunumo.

/11/ István Vadász: Iu Ebla Ekzemplo de la Malformala Lernado. La Projekto „Invite” en la Muzeo „Pál Kiss”

„En Aprilo de 2007, unu Ĉehuja organizaĵo plenuminta instruon de plenkreskuloj per tiu peto serĉis la muzeon en Tiszafüred (Tisafured), ke aliĝu al la programo tielnomata „interkultura renkontiĝo. Ties esenco estas, ke ekirigu tian agadon (inter mueoj, bibliotekoj, teatroj, metiistoj, amatoraj artaj grupoj ks.) pere de monstro de la kultura multkoloreco esprimiĝas ankaŭ la Eŭropa aparteno unu al alia. La Projekto „CYRIL:Culture in Your Region in Informal Learning/CYRIL:Kulturo en Via Regiono en Malforma Lernado – nomon ricevis. La internacia projekto je la Ĉeĥa iniciato fine ekiris ne nur en Hungarujo, sed ankaŭ en Islando, Kimrujo, Litvanio, Rumanio. (Vidu la retpaĝon: [www.decside.ac.uk/employers/cyril/](http://www.decside.ac.uk/employers/cyril/)) Ties celo en Tiszafüred tiel realiĝis, ke la Muzeo Paŭlo Kiss prezentas la etnografiajn elemewntojn de ĉirkaŭaĵo de Tiszafüred, kaj pere de tio la tie vivanta fremdlingva loĝantaro kaj la tie vizitadaj en- kaj eksterlandaj turistoj povas ekkoni la plej karakterizajn rilatojn de ĉi regionunuo de Hungaruja kulturo. Pere de la ekspozicio- gvidadoj okazantaj al la planitaj konstantaj kaj provizoraj ekspozicioj, por tiuj fremduloj malfermiĝos okazo por konatiĝi kun la samlokanoj kaj tiel ili povas pli bone, pli senpere havi sian parton en la muzeo donita kultura travivaĵo. Ĉi tiun gradigas ankaŭ tiu iniciato, ke po someroj; julie, aŭguste en kadro de klerigo de plenkreskuloj krom la hungara lingvo ankaŭ antaŭinstruitaj gelernantoj, studentoj faras ekspoziciogvidadon eĉ ankaŭ prelegojn por la eksterlandanoj.”

/Mi mencias ke en la jaro 2008-a dum la Hungespola Renkonto en Miŝkolco, la estraro de la Pola Esperanto-Asocio kaj reprezentantino de la pola Universitato en urbo Łodz serĉis la saman kontakton pere de ni Miŝkolcaj geesperantistoj kun la Miŝkolca Universitato, sed ties reprezentanto ne aperis dum la kunveno. La Miŝkolca Universitato nek tiam, nek ekde tiam havas la necesajn cirkonstancojn aliĝi al tiu programo./

/12/ Sinjorino Irén Kállai: Spertoj de la Referencia – Klerigo de la Projekto: „Dum la Tutvivo daŭra Lernado en departemento Bihar” en la Muzeo Bihar.

„Celo de la projekto estas: Evoluigo, utiligo de loĝantartena forto de la setlejoj, la areo (Berettyóújfalu), pligrandigoj de la ĝenerala kulturo, pretendo pri lernado de la loĝantaro, pligrandigoj de la talento-rutino de homoj. Kaj apud ĉi tiuj la praktika elprovo de la Eŭropaj novaj atendoj de la instruado de plenkreskuloj kaj evoluigoj de la al tiuj bezonataj objektaj kaj

humanaj fortfontoj” kiel klare esprimis sin Irena Kállai. Dum la ekzercoj travivitaj travivaĵoj aktivigas la kaŝitan scion de la individuo, surfacigas iliajn pretendojn al la daŭra lernado.

/14/ Szilvia Simándi: Muzeoj kaj la Turismo

De nia epoko la turismo estas unu el la plej gravaj manieroj por elĉerpi libertempon, kiu karakterizas ĉefe la someran tempoperiodon. La turistoj - allogataj aŭ de la naturo aŭ de la homo kreita tirforto - pasigas signifan parton de sia libertempo. La muzeoj apartenas al la lasta teritorio. Se ili reiras en la jam rigarditan muzeon tio signifas, ke ili estas scivolemaj pri la ŝanĝoj, ke ĉu ĵus tiam kiun valoron prezentas rigardi el siaj trezoroj la jam konata muzeo. Se novan lokon vizitas la vojaĝanto, scivolemas pri la lokhistoriaj kaj alikarakteraj kulturaj valoroj, vidindaĵoj de la konkreta loko, kaj atendas la hejmenatingon, kiam hejme la hejmanoj povos raporti pri ĉi tiuj travivaĵoj, pri sia pleniĝo. La pludonitaj konoj vekas interesiĝon de la pluraj homoj, kaj ofte okazas, ke ankaŭ la informitoj vizitas la konigitajn lokojn. Tial gravas la decida rolo de turismo en interpreto de kulturo. Ĉi tie menciindas la rete okazanta informfluigo, ĉar pere de tio multspecia kono atingas la serĉantojn. Sed la persone en la muzeoj akiritaj scioj, la spertita travivaĵo estas tamen tute alia. Pli profundajn spurojn lasas ili en la vizitanto. „Tial, al la reto superŝutitaj tekstoj devas esti tiaj, ke ili igu la serĉantojn por viziti persone la certajn lokojn de la atingebla scio” – esprimis la prelegantino Silvia Ŝimándi sian opinion pri la demando, kaj mi tute konsentis pri tio. Mia opinio por apogi niajn konojn nur al la rete troveblaj, estas memtrompo, kiun proponatas oni eviti kiel eble.

/29/ Sinjoro Zoltán Riczu: Muzeoj kaj Vizitantoj – Ĉu La Muzeojn Povas Ni Fari Pli Allogaj? Kiel anoncis la preleganto komence sian parolon, multfoje li demandis sin; se li ne kontaktiĝus kil nun al la muzeo, ĉu li kiel privatulo enirus la muzeon multfoje? Fine li konvinkis sin pri la jeso, ĉar „la muzeaj objektoj estas pruvaĵoj de la pasinto, sen kiuj ne eblas skribi historion, tial trezoro estas ĉiu ekspoziciita objekto de la muzeoj.” Li ŝatas tiujn objektojn, li bezonas ties admiradon, do li certe vizitus ĝin ofte. Se dal tio, ke la muzeo signifas altiron por aliulo, ne ĉi tio estas la unusola kaŭzo. „Gravas la ekstera apero de la konstruaĵo, ĝia distanco de veturiloj, mezuro de la enirkosto, la lokigo de la ekspoziciitaj objektoj, ties lumigiteco ankaŭ el vidpunkto de la bona legebleco de la skribitaj materialoj, la kielfaro de la ekspozicigvido, dum kiu oni povas atenti ties aŭskultitan tekston kaj ankaŭ la objektojn povas rigardi, kia estas la muzea personaro; ĉu ĝi povas servi per informoj al la vizitanto por trovi kion kie, aŭ kion rigardu la vizitanto. Krome: kia estas la muzea vizittempo, por kelkuloj gravas por trovi tie geamikojn, aŭ ĉu ili povas ligi novan konatecon kun iu, eble kun ĵus kompetente sperta persono.” Laŭ mi gravas ankaŭ la ekspozicion akompanantaj programoj. Se al la intereso de la vizitanto la proponitaj eblecoj de la muzeo entute konvenas, ankaŭ aliam eniros ĝin por ĉasi novajn trezoraĵojn. Se la muzeovizito amuziga estis, tiuokaze granda estas la delogo, ke iu rakontante pri la viditaĵoj ankaŭ aliulojn allogu tien,

/30/ Sinjoro József Szabó: Ferma Parolo: Muzeoandragogia Konferenco – Estonto de la Muzea Instruado de Adoltoj

„La Unua Konferenco pri la Muzea Instruo de Adoltoj malfermis novan vojon inter la diversaj scienco-branĉoj” - komencis doktoro Jozefo Szabó la fermoparolon de la libro. „Ĉi konferenco

direktigis atenton al tio, ke la tradiciaj muzeaj roloj plivastiĝas en la moderna epoko per novaj taskoj, kaj tiuj pretendas novajn fakulojn. La pli frua bone funkcia kontemplado – bezono de la kontaktoteno kun la lernejoj – ankaŭ nun validas, sed ĉi rondo nun disvastiĝas pli potencie al la adoltoj. Ĉi tie ni diferencigas la partoprenantojn havante sian parton en la supergrada instruado, la laborantajn gemezaĝulojn kaj la pliaĝulojn en kies vidpunkto la kun ili okazanta, kontaktokonstruo, vekon de ilia interesiĝo oni povas atingi alimaniere ĉiuokaze. La muzeojn oni tenas la plej bona scenejo de la hominstruoj, ja oni tie ekspozicias tiujn objektojn, sur kiuj baziĝas nia historio kaj kutim-kulturo. La novaj sciaj klerigopretendoj, al la socio direktiĝantaj edukaj agadoj formuliĝas en la muzea klerigo de adoltoj.” Sinjoro Jozefo Szabó per ĉi vortoj vortigis sian opinion pri estonto de muzea klerigo de adoltoj:”La pli longa vivdaŭro povas fari ebla, ke la pensia- aĝogrupo aperu pri tiaj pretendoj, kiajn ĝis nun ni malpli spertis.” „Je tiuj ŝanĝoj devas antaŭprepari sin ĉiu fakulo laboranta tiutere, inter ceteraj ankaŭ la klerigo. Tial ni renkontiĝas en kelkaj klerigoj kun la fako instruado de adoltoj, el kio en la estonto povas elkreski eĉ memstara klerigo. Ankaŭ tial gravas, ke kiel daŭrigon de la Konferenco, ni montru tutmonde niajn ĝis nun atingitajn rezultojn.” Mi atestas la muzeojn unurangaj praktikaj scenejoj, sed en la teorian instruon proponata estas enpreni la konmaterialon de la iama fako: „popolklerigado”, la retorikon, la instrumentodologion kaj la psikologion en interesoj de la pli facila kaj altnivela okupiĝo kun la diversaĝuloj.

La fakliteratura libro „Muzea Instruo de Adoltoj” – malkovris antaŭ mi multajn interesaĵojn, unu novan tute nekonatan kulturbranĉon. Ĝi prezentis vivon, agadon de la Hungarlandaj grandaj muzeoj, la komencitan novan vojon, ties motivojn kaj imagojn pri la estontaj muzeoj. Mi volonte vizitas muzeojn, galeriojn prelegojn. Ĉar la politiko-ŝanĝo pr. neniigis nian pli fruan kulturalan vivon, por anstataŭigi ĝiajn nunajn mankojn, por krei novajn kulturajn cirkonstancojn, mi akceptas bona ideo la elkonstruon de la muzea-instrusistemo. Mi akceptas prava la konfesion de sinjoro Zoltán Riczu: ”la en muzeoj troveblaj objektoj estas trezoroj de nia nacio, kiujn devas koni niaj ĉiuj sampatrianoj kaj la ĉi tien enmigrantoj.” Mi akceptas laŭcela, ke niaj vizitantoj fremduloj ekkonu tiujn valorojn, ĉar pere de tiuj ili povos ekkompreni niajn popolon kaj agojn. Tial mi tenas gravaj; ke oni instruu krom la hungara lingvo ankaŭ hungaran literaturon, historion kaj prelegu pri la hungaraj muzeoj al la enmigrantoj, por doni al ili la komencan kulturalan pakaĵon pri nia kulturo. Mi proponas krome, ke hejmpaĝoj de la muzeoj, galerioj, ekspoziciejoj enhavu la programojn de la koncerna institucio, estu tiuj en ĝisdataj statoj, por ke la interesanto povu serĉi pri tiuj la por li/ŝi plaĉan programojn laŭ la libera elejtebleco. Ja la homo multfoje elektas tion kio estas antaŭ sia nazo. Sed, se ne nio estas rigardebla tie, kiu kion elektu? Pensojn vekita estis la enpaŝo en la muzean instruadon de la adolklerigo, parte de la hungaraj supergradaj instruoinstitucioj aliĝintaj al la tn.: „instrusistemo de Bologna”. En Eŭrop - Unio la kulturo estas afero de ĉiu regno. Ĉi sistemo tamen tute aliigis la hungaran superan instrusistemon elformiĝantan post la dua mondmilito, konata kaj rekonata jam tutmonde. Tamen ni esperas, ke funkcio de ĉi nova sistemo pliboniĝos, estiĝos bona kontraŭ siaj nunaj ĉiuj malfacilaĵoj. Nialande estas la plej granda la morta-proporcionombro el inter la Eŭropuniaj landoj. Ties kaŭzoj estas: la trostreĉita vivmaniero ekde la politika ŝanĝo, la timego pro perdebleco de la laborejoj, la plialtigo de aĝo por havi pension, la plilongigo de laborhoroj (anstataŭ la socialismepokaj 8 horoj nun la 10-16 horoj po tagoj), la forprenoj de liberaj- kaj ripoztempoj post plenumo de

devige deciditaj labortempoj dirante, ke „tio okazas en intereso de la laboro”...ks. Rigardu, ke por ekvivi kulturan vivon inter la menciitaj cirkostancoj, plejparte la homoj povas nur dum siaj someraj libertagoj. Jen situacio nun de la laborantaro, sur kiu volas apogiĝi la muzea klerigo de adoltoj. Mi konvikiĝis, ke roloj de la muzea pedagogo ĉiurajte plenumiĝas ĉe la lernejoj, la muzea andragogio (instruo de plenkreskuloj) ĉe la altlernejoj, universitatojn plenumataj/plenumitaj ankoraŭ ne tro okupataj gejunuloj, kaj se la maljunuloj havas liberan tempon apud eduko de la genepoj, tiokaze ĉe ili laŭ la tria aĝa aŭ alinome la gerontologia edukosistemo.

Al la supre skizita nov-voja funkcio mi deziras al ĉiuj hungaraj muzeoj: multe da animforto, bonaj kune laborantoj, bona sano kaj persisto!

Fine mi dankas la honorigan fidon parte de la aŭtoroj de ĉi libro, por ke je ilia peto mi povis skribi konigon, opinion pri la tre interesa 309 paĝa muzea fakliteratura libro.

Miskolco, 19.03.2011.

Sinjorino Adrienne Pásztor

D+FD de UEA en Miŝkolco por Hungarujo

## Jardatrevenoj en 2011

**105 jara** estas la Esperanto-Teatro, en 2011

**105 jara** estas la Unua Esperanto-Klubo en Nowy Sącz, Pollando

**105 jara** estas la datreveno de la naskiĝo de la revuo “Pola Esperantisto”

**Antaŭ 100 jaroj naskiĝis**

Karlo Fajsz (25.04.2011); la granda kolektanto de esperantlingvaj libroj. Oni tenas rememorojn pri li en oficeja ĉambro de la Hungarlanda esperanto-Asocio. Vidu pri li la nekrologon: <http://www.oik.hu/eszperanto/fajsz.htm>



info@esperanto.org.au

**100 jara** estas la Esperanto Klubo en Kopenhago.

**90 jara** estas la Esperanto Klubo Antaŭen en la finnlanda urbo Tampere.

**55 jara** estas la de reaktiviĝo de E-movado en Nowy Sącz, Pollando

**la 32a** Tutpollanda Esperanto-Kongreso okazis en urbo Nowy Sącz de la 30-a de aprilo ĝis la 7-a de majo 2011

Duoblan jubileon havas "La Ondo de Esperanto": **20-jariĝon** de la relanĉo de la magazino kaj apero de ĝia **200-a numero** (junio 2011).

s-ino Adri Pásztor

### **2011: Estas Internacia Jaro De La Instruado**

La instruo de la infano, komenciĝas en la familio. La foto montras kazojn de la hejmaj instruadoj de matematiko, gravitacia eksperimento kaj kantolernado.. La bildojn fotis kaj sendis s-ro Teodor Andreas - iama pedagogo - el la orient-slovakia urbo Košice:



Kia ajn estas malfacila la matematiko, fare de iu kariĝe racia maniero, ĝi povas estiĝi plifacile perceptebla.



Ho, la pomo subfalas ĉiam.



Kantolernado

**Pásztor László**

### **Vilaĝa somerumo**

Mi pasigis unuajn lerneajn jarojn de mia infanaĝo en iu ebenaĵa setlejo. Ni loĝis en familia domo, kie miaj gepatroj okupiĝis pro bestotenado, produktis plugkampajn kreskaĵojn kaj legomojn. Ĉi tiel ili provizis la familion per ĉio, kio estas bezonata al la mastrumado. Ilia klopodo treege plaĉis al mi kaj efike de tio mi ekŝatis la naturon.

Mi estis 12 jaraĝa, kiam oni nomumis mian patron ĉeflibrotenisto kaj li translokiĝis al Miskolc, kien ankaŭ nia familio sekvis lin. Ĉi tie ni loĝis ne en familia domo, sed t.n. „en ludomo”. Ni ne havis jam taŭgan terenon por breedi bestojn, por produkti legomojn kaj tiuj tre ege mankis por ni. Mi estis malĝoja, ne trovis mian lokon. Odoro de la kampoj kaj la libereco ege mankis al mi.

Sekvan someron / en 1953/ mi ankoraŭ ne estis 13 jaraĝa, kiam miaj gepatroj iufoje demandis min:

- ĉu vi havus emon por somerumi en vilaĝo?
- Ho, jes, mi havus emon – mi respondis entuziasme, ĉar la demando tre ege entuziasmigis min.

Pasis kelkaj tagoj, dume miaj gepatroj decidis: mi povos somerumi en vilaĝo de fino de la lernoĵaro ĝis mezo de aŭgusto. La nomo de la vilaĝo estas ankaŭ nun Újkígyós (ujkidjoŝ), kio estas en departemento Békés. Mia baptopatro estis tie buĉisto, same kiel aliaj onkloj de mia patrino kaj estis membro de la loka agrokultura kooperativo kaj mastrumadis sur la ricevita tereno.

Miaj gepatroj aĉetis la fervojbileton, precize por mi notis la taŭgan horaron kaj sekvamaten mi povis ekiri. Mi devis ŝanĝi dumvoje vagonaron. Post la transvagoniĝoj mi trovis novan vojaĝantan komunumon, kie kelkfoje estis ankaŭ infanoj, ĉi tiel mi bone amuzis. Mi alvenis al

Újkígyós vespere. Stratoj de la vilaĝoj estis puraj, antaŭ la domoj florbedoj plezurigis la ĉirkaŭrigardanton. Mi treege ĝuis ĉi tiun reaperantan vidaĵon de mia infanaĝo.

Alvenante al la Kossuth-strata domo, miaj gebopatroj akceptis min ege kare, demandante: kiel mi vojaĝis? Ĉu mi estas laca, aŭ eble malsata? Ili regalas min, mi trinkis tason da mamovarma lakto kaj manĝis freŝe bakitan panon el bakforno. Ja ili sciis, ke mi ŝatas ambaŭ. Tiuj estis tre bongustaj, sed la plej bone la bonvola regalo emociis min. Post iometa ripozo – kvankam estis antaŭtempa vespero - mi iris al la stalo kaj rigardis la delonge neviditajn bovinojn, ĉevalojn. Ĉirkaŭrigardis mi ankaŭ en la korto, enrigardis al la porkejo kaj admiris ankaŭ la flugilbestojn. Baldaŭ mi rimarkis kaj laŭdis la denove elformitan legomĝardenon ĉirkaŭ la puto. En tiu malgranda ĝardeno bele viciĝis vicoj de la kreskaĵoj. Estis tie petroselo, karoto, cepo, majorano kaj fazeolo. En la loĝdomo estis du ĉambroj, kuirejo kaj kamero. Apud ĉi tiuj ejoj estis longa verando, ĉe ties fino estis metite unu fajrujo. Mia baptopanjo tie kuiris somere. Ĉi tiel la kuirejo de la domo restis pura, kie estis la bakforno. En tiu la bakforno mia baptopanjo bakis panon, kelkfoje farĉitan kokinon per pomo, vualkukon farĉita per kazeo, vualkukon farĉitan per kukurba papavo. En ĉi tiu domejo estis ĉio, kio estas bezonata al la vilaĝa vivo.

Post ĉi tiu rigardado mia baptopanjo invitis nin al vespermanĝo. Ŝi regalas al min per hejme faritaj lardo kaj kolbaso kaj la mamovarma lakto. Poste mi iris por dormi kun abundaj travivaĵoj, sed efike de la travivaĵoj delonge mi ne kapablis dormi, ĉiam mi pensis pri la viditaj aferoj kaj la sonĝo ne fermis miajn okulojn delonge.

Kaj je kio mi vekiĝis? – Matene je la 5-a mi aŭdis kokokrion. Miaj gebopatroj jam agadis. Mia baptopaĉjo faris la matenajn laborojn: ĝuste li elportis la sterkon el la stalo al la sterkejon, purigis la porkejojn kaj manĝigis, trinkiĝis la bestojn. Kiam li finis tiun laboron, tiam mia baptopanjo invitis min por matenmanĝi. Ŝi jam preparis la tablon por matenmanĝi, metite sur ĝin la freŝe faritajn omletojn, mielon, buteron kaj ceterojn.

Post matenmanĝo mia baptopaĉjo montris al mi, kiel oni devas jungi la ĉevalojn al la ĉaro, dume ni jungis du ĉevalojn al la ĉaro. Poste ni ekiris al la fervojstacio kaj portis al la poŝto de la vilaĝo al vagonaro sendaĵojn. Bedaŭrinde ĉi tiu etŝpura fervojo jam nun ne ekzistas, oni nuligis ĝin kaj la loĝantaro trafikas per aŭtobuso.

Ĉirkaŭdoma bieno de miaj gebaptopatroj tre ege plaĉis al mi. Tiun ili ricevis de la loka agrokultura kooperativo. Tiu konsistis el pluraj terenoj. Ili taŭgis por kultivo de diversaj kreskaĵoj. Sur ĉiuj terenoj ili kreskigis iun kreskaĵon, furaĝplantojn por la bestoj, /trifolion, luzernon, maizon/, legomojn, terpomojn por la kuirejo, tritikon por baki panon el ĝia faruno kaj akvomelonon por vendi. Mia baptopaĉjo estis tre kapabla kaj lerta mastro pri agrokulturo, apud sia metio /li estis buĉisto./

Mia baptopanjo mastrumis kaj sur malgranda tereno ĉirkaŭ la puto, same granda kiel ĉambro ĉirkaŭ la puto, kulturis la jam menciitajn legomojn, eĉ prizorgis la florbedojn, kaj faris florplantojn. Ŝi montris fiere siajn tomatojn, paprikojn kaj florojn. Ŝi plantis siajn florojn antaŭen de la domo, en la antaŭdomajn florbedojn kaj en la tombejo sur la familiajn tombojn. Dum la semajnfinoj ŝi bakis panon en la kuirejo en la bakforno, kiun ankoraŭ iam ŝiaj gepatroj

konstruis. Nu, ĉi tio estis la vera travivaĵo por mi. Dum antaŭa tago mi helpis enporti la aron da maiztigoj hakitajn al malgrandaj pecetoj antaŭen de la bakforno, ĉar mia baptopanjo kutimis hejtigi la bakfornon dum antaŭa vespero. Je la kvara dum tagiĝo ŝi knedis la pankrudaĵon en la knedujo kaj post ĝia ŝvelo formis ĝin al panoforno kaj metis per panŝovelilo en la bakfornon. Dum la pano bakis, ŝi melkis la bovinojn, la lakton filtris kaj regalis al mi por trinki duon litron da lakto. Sed jam ŝi eksentis odoron de la bakinta pano. Ŝi elmetis ĝin el la bakforno kaj lasis por malvarmiĝi. Ŝi bakis panon por unu semajno. Ŝi metis la panojn en pura tolaĵo. Tiuj ne ŝimis, ne sekiĝis kaj ne paneriĝis, kiel la nunaj. Al tiu, simila pano nuntempe ne ekzistas! Ankaŭ la lakto estis tre bongusta. Ŝi ĉiam faris el la lakto acidan lakton, kazeon, buteron. Ŝi konservis tiujn malvarmigite. Dum la somera varmega vetero estis refreŝiga unu bovlo da acida lakto. Mi lekis ĉiam ĝoje de la lakto sur mia buŝo adherintan dikan laktokremon. La nunaj infanoj ŝajne ne scias, kia ĝuo estas ĉi tio, eĉ ne scias, de kie devenas la lakto. Ili konas nur la t.n. „briko-lakton”.

Dumtage mi iris por ludi kun mia aliurbana amiko, kiu alvenis same por somerumi al siaj parencoj. Ni ludis kiel indianoj, ni imitis la indianokriojn, faris sagojn kaj pafis en celon. Sed la indiano estas nur vere la indiano, se sian ĉapelon ornamas per koloraj birdoplumoj. Ni ne havis tiajn plumojn. De kie kaj kiel ni akiru la neseseajn plumojn? Ni decidis! Kaj ni kaptis du kokojn de la najbaro, elŝiris iliajn plej belajn vostoplumojn, ne zorgante pri ties lamentadoj kaj metis sur niajn ĉapelojn la belegajn akiraĵojn. Kiam la posedanto ekvidis siajn malfeliĉajn kokojn de siaj vostoornamojn senhavigitajn, riproĉante pelis nin trans la tuta vilaĝo, poste priplendis al niaj parencoj nian bubajon. Ili demandis, kial ni faris tiun malsaĝecon. Responde ni diris, ke ni volis esti veraj indianoj. Ankaŭ ili riproĉis, kaj ni devis promesi, ke neniam ni ne agos same, kaj ni ne suferigos tiujn malfeliĉajn bestojn.

Matene kaj vespere ne okazis ludo, ĉar ni iris al la fervojstacio kaj al la poŝto por liveri la sendaĵojn. Por mi estis travivaĵo, ke mi povis esti la koĉero, mi povis preni la kondukilon kaj povis krakigi la vipon, kies tenilo estis ornamita kaj lignoskulptita. Sed mia baptopaĉjo ne lasis peli, timigi la ĉevalojn, ĉar ege ŝatis kaj indulgis ilin. Mi ĝuis, ke mi povis esti la koĉero, kiu direktas la ĉaron de la unua sidloko de la ĉaro. Mi sciis, ke mi estas speciala infano, ĉar miaj samlernejoj ne havis tiujn ĉi travivaĵojn.

La rikolto same estis vera travivaĵo por mi. Mia baptopaĉjo falĉis la grenon, mia baptopanjo kolektis kaj ligis en garbojn, poste metis krucformajn staketojn. Poste mia baptopaĉjo metis la du fojnamasportilojn sur du flankojn de la ĉaro kaj montris al mi, kiel eblas meti sur la ĉaron multe da garboj. Li donadis la garbojn kaj mi metis ilin unue sur la fojnamasportilojn kaj poste en mezon de la ĉaro. Kiam la ŝarĝo atingis la du metran altecon, ni ligis la ŝarĝon per ŝnurego kaj poste liveris hejmen. Mi sidis fiere sur la ŝarĝo kaj instigis por iradi du ĉevalojn. En la domejo mi donadis la garbojn kaj mia baptopaĉjo metis tiujn en la garbaron, ĉar ĉi tiel ni devis prepari al draŝado per draŝmaŝino. La draŝmaŝino disigis la semojn, la pajlon, la postdraŝan grenrestaĵon, la pajlodefalaĵon. Mi tre ege ĝojis, ke povis helpi al miaj baptogetatroj ankaŭ ĉe ĉi tiu laboro.

Frumatene kaj malfruvespere okazis purigoj de la stalo kaj porkejo kaj ceteraj bestoj. Oni nomis tiun laboron hungare kiel „ganéjózás”, dume ni elportis desub la bestoj la pajlan

sterkon al la sterkejo. Mia baptopaĉjo ĉi tiun sterkon liveris aŭtune al la membroparceloj por kompletigi la mankantajn nutraĵojn de la grundo.

Ankoraŭ dum la lerneja ferio okazis rikolto de la akvomelonoj. Ni iris jam frumatene al la melonkampo. Ankaŭ tiam ni povis esti sur la koĉero. Alvenante tien ni ne maljungis la ĉevalojn, sed tuj ni komencis kolekti la akvomelonojn.

- Jes, sed kiaj estas la maturaj akvomelonoj?

Mia baptopaĉjo klarigis al mi, ke tiu akvomelono maturas, ĉe kiam la tigo estas seka, facile apartiĝas de la kreskaĵo kaj dum frapo ĝi sonas. Mi serĉis feliĉe ĉi tiujn akvomelonojn. Ni metis ilin en stakojn, poste mi donadis ilin al la ĉaro al mia baptopaĉjo. Poste ni liveris la ŝarĝon al la transprenejo. Tie la transprenanto pesis la ŝarĝon kaj la antaŭen konstatitan prezon pagis al mia baptopaĉjo. Mi estis feliĉa, kvazaŭ ankaŭ mi estintus mastro, sed almenaŭ pro tio, ke ankaŭ mi kontribuis al sukceso de la produkto de la akvomelonoj, je ĝojoj de miaj gebaptopatroj. Sed mi sciis, ke la plantaĵojn ili devis ankaŭ ratri, senherbaĉigi kaj ili laboris multe en intereso de la sukceso.

Jam mi menciis, ke en la korto estis unu fosita puto kun akvoleva rado (el tiu puto oni tiris la akvoplenan sitelon helpe de ĉeno tordita sur lignan cilindron, kiu estis movebla per fer-rado). Ĝia akvo estis malvarma kaj kristalpura. Ĝia profundeco estis 20 metrojn, sed jam en profundo de 8-10 metroj, ĝi servis kiel fridujo. Mia baptopanjo en tiu puto malvarmigis la restintajn manĝaĵojn kaj ankaŭ kelkajn akvomelonojn mallevis en la sitelo de la puto. La malvarmigita akvomelono estis tre ege refreŝiga en la somera varmega vetero. Ĉiam mi diris al ili:

- Ĉi tio estas la vera, majesta akvomelono!

Se dome elĉerpiĝis la furaĝkreskaĵo de la bestoj /trifolio, luzerno, aŭ silomaizo/ alparolis al mi mia baptopaĉjo por iri al trifoliokampo. Mi tuj saltis por jungi la ĉevalojn. Ni metis al la ĉaro unu falĉilon kaj unu forkegon, mansignis adiaŭon al mia baptopanjo kaj ekiris. Mia baptopaĉjo falĉis iometon da trifolio kaj mi donadis ĝin al la ĉaro. Hejme mi donadis suben la furaĝon de la ĉaro. Sekvatage silomaizon, alitage luzernon ni liveris hejmen. Sunsubire ni atendis sonojn de la sakflutoj de la bovo- kaj porkpaŝtistoj, kiuj signis, ke ili peletas hejmen la bestojn de la paŝtejo. Mi venigis tiujn al la korto kaj mia baptopaĉjo peletis la bestojn al iliaj lokoj. Se la bestoj pisis, aŭ fekis antaŭ la domo, la fekaĵon mi devis forigi kaj porti al la sterkejo, kiu estis ĉe fino de la korto. Antaŭ la domo sur la strato malpuraĵo ne povis resti, kion ĉiuj sciis. Pri ĉi tio mi memoras iun ŝercan demandon, kiun mi aŭdis tie:

„Kio estas la absoluta certo?” „Tio estas, ke la bovinfekaĵo ĉiam falas sur sian platon.” – klarigis al mi la vilaĝanaj infanoj.

Kiam la ferio finiĝis kaj mi devis prepari min por hejmenvojaĝi, mi estis malĝoja pro finiĝo de mia somerumo, sed mi estis ankaŭ feliĉa, ĉar mi riĉiĝis per karaj travivaĵoj. Mi dankis al miaj gebaptopatroj pro la zorgado kaj ke mi multe ekkonis el la vilaĝa vivo. La belegaj vidindaĵoj de la sunsubiroj estas neforgeseblaj por mi kaj la vesperan trankvilon sur la stelluma ebena mi neniam forgesos. Fine, efike de la akiritaj travivaĵoj mi sukcesis decidi pri

mia profesio. Mi elektis metion el la agrokulturaj fakoj: mi iĝis ĝardenisto. Kaj ĉar ankaŭ mi volis transdoni sian scion al aliaj, same kiel miaj gebaptopatroj, mi iĝis ĝardenist-inĝeniera instruisto.

Ĉi tiajn kaj samajn travivaĵojn - bedaŭrinde - la urbaj infanoj ne povas travivi. Pro tio ĉi ili ne konas la vilaĝan vivon, kiu postulas multe da oferadoj, sed donas ankaŭ multe da ĝojoj, animaj pacoj, ekvilibrigejoj.

Dank'al Dio, mi ricevis el tio gustumaĵon.

## **La 8a de Marto kaj la 22a de aprilo; la Tago De Tero**

„Finfine 287 mesaĝoj el 68 landoj kaj teritorioj atingis Hiroŝimo okaze de Internacia Virina Tago” laŭ mesaĝo de s-ino Osioka Taeko. „La mesaĝoj de la mondo kuraĝigas virinojn de Hiroŝimo por lukti plu por paco kaj amo sen nukleararmiloj kaj sen ĉio malbona al la homoj kaj la terglobo. Ekde la 23a februaro ĝis la 6a marto ĉe la Centroj de Civila Interŝanĝo kaj Virina Edukado okazis ekspozicioj de la mesaĝoj.

### **Ekde la 11a marto japanoj vivas en funebraj tagoj**

Jam tri semajnojn pasis post la katastrofo, kaj la ĉefministro esprimis, ke la registaro el sia energia plano eble nuligos novan konstruon de atomcentralo. Elkore salutas vin dankante vian kunlaboron, nome de Internacia Virina Tago 2011 Hiroŝimo;

OSIOKA Taeko, Hirosima Esperanto-Centro/osioka@mua.biglobe.ne.jp”

## **Tristaj okazintaĵoj en Japanio**

„De: KIKUSIMA Kazuko (Krizantemo), Japanio - al: s-ino Adri Pasztor, Hungario

TOKIO, 13 marto 2011

Estimataj gesinjoroj!

Ni en Tokio restas sen problemo, kvankam nin atakis grandegaj skuoj neniam spertitaj. Sed en la norda regiono vere nekredible grandioza katastrofo okazis. Nu, la tertremoj ne tro multon kaŭzis, sed la cunamoj kaŭzitaj de la tertremoj en la maro kaŭzis nekredblaĵojn! Kiam ni scios, kio entute okazis, mi raportos ankaŭ al vi. Eventuale monatojn poste.

Kun koraj dankoj pro viaj mesaĝoj kun viaj zorgemoj, Krizantemo /2011. márc.13.18:43”

„Karaj

Dankon pro via konsolo kaj simpatio. Ni en Hiroŝimo havis nenian damaĝon pri tertremo, sed en nordorienta regiono granda katastrofo okazis. Tagon post tago la damaĝo klariĝas kaj pligrandiĝas. Plejble la kerna konstruaĵo de la atomcentralo en gubernio Hukuŝima eksplodis, sur televida ekrano de NHK. Radioaktiveco ekster la centralo altiĝis, detektita estas 1015 ms. en unu horo, kiom nature homoj ricevas dum unu jaro, laŭ informo de NHK. Nun la konstruaĵo staras nur per feraj ostoj sen muro kaj tegmento. 50000 loĝantoj plejparte evakuis eksteren pli ol 10 km for de la centralo.

OSIOKA Taeko kaj Moritaka”/ osioka@mua.biglobe.ne.jp”

” Estimata s-rino Pasztor,”

Koran dankon pro via amikeca kaj varma mesaĝo. Mi fartas bone. Post la tertremo mi restis hejme, ĉar mia loĝejo preskaŭ ne difektiĝis, sed la nukleaj centraloj ne normaliĝis, kaj mi, mia edzo kaj du katinoj transloĝiĝis al la domo de mia bofratino en la gubernio Gumma. Mi esperas reveni hejmen frue laŭeble, sed neniuj scias kiam tio re<http://koharu-verda.jugem.jp>

aliĝos.

Kun dankego kaj elkoraj salutoj,

via YAZAKI Yoko verdachan2151@yahoo.co.jp” :/ <http://koharu-verda.jugem.jp>

La 27-an de marto 2011a/”

## **Tertremoj, cunamo**

Bedaŭrinde ankoraŭ ne venis Tago de Tero, kiam la 11an de marto tertremo skuis Japanion kaj cunamo sekvis ĝin ankaŭ pluraj katastrofoj: la cunamo kaj de la atomcentralo. La tektoniko de platoj respondon donas al: migrado de kontinentoj, naskiĝo de oceanoj, estiĝo de montaro, funkcio de vulkanoj kaj al la tertremoj. La ĉi tiujn esploranta klariga teorio estas la „plat-tektoniko” – informiĝis mi el la: „Ĉu vi konas la Teron? - titola, esperantlingve verkita ” scienca libro de d-ro Endre Dudich profesoro pri geologio. Por mi interesa estas, kvankam la homoj havas seizmologian aparatojn, tamen ili ne mezuras, ne montras antaŭen la tertremojn. Nur pere de ili kaj pere de la komputilaj kalkuloj oni povas decidi pri alveno de cunamoj, kaj laŭ tiuj oni povas eldoni famojn per la klarigoj pri alarmoj de cunamoj. Sed ankaŭ tio povas okazi, ke la cunamo venas rapidege kaj oni ne povas jam alarmi ĝustatempe. pri la Japanon atingotaj detruaj tertremoj kaj la bordojn finbalaintaj per cunamo kaj la katastrofo de atomcentralo kaj pri ties kaŭzoj, la famkanaloj donis jam multegajn anoncojn kaj klarigojn. Pri la japanaj katastrofoj ni ricevos raporton el Japanio, laŭ la supremenciita promeso. Post ĝia enveno, ni publikos ĝin. Mi esploris pri situacio de vulkanoj de Japanio. Pri ties konkludoj mi skribas nun, pri tiuj scioj, kiujn multaj homoj povas ne koni.

## Vulkanoj de Japanio

El inter la vulkanoj speciale famas ekz. la kredinta al malfunkciiĝanta: **Bandai-san** (bandaj-san, 1819 m), kiu post pli ol 1000 jara dormo neatendite eksplodis en 1888. Dum la verva, akvoplenta eksplodo, el la norda duono de la konstruiĝanta rubkonuso de materialo kreita dum pli fruaj eksplodoj, ĉ. 1,2 km<sup>3</sup> materialo flugis en la aeron. La eksplodo tutkalvigis ĉirkaŭe 70 km<sup>2</sup>-jn da tereno, kaj postulis 460 homajn vivojn. De tiam ĝi denove dormas, sed varmakvoj signas ĝian aktivecon. De ĝi suden 104 km<sup>2</sup> surfaca **lago-Inawashiro** (inavaŝiro) kreiĝis dum mil jaroj post la granda eksplodo de la Bandaj-san, per vulkana dereteno. Ankoraŭ pli suden la alia granda du-kratera, Vulkano-tipa andezit-tavolvulkano la **Asama-yama** (asama-jama, 2568 m) preskaŭ ĉiam funkcias. Ĝia plej granda, ĉirkaŭ 12 milojn da homvivoj postulanta eksplodo okazis en 1783, sed ĝi kaŭzis same grandan detruon ankaŭ en 1935. Vulkandevenaj estas norde: la grandan kraterkaviĝon pleniganta **lago-Towada**, aŭ la elstara fremdultrafika centro en proksimeco de la fama Nikko, ĉe piedoj de vulkanoj **Shirane-san** (Ŝirane-san) kaj ankaŭ la **Nantai-san** (Nantaj-san) per dereteno estiĝinta **lago-Chuzenji** (Ĉuzendĵi); la akvo de la lasta subfalegas de ĉ.100 metra alta plej belega akvofalo (de Kegon) en Japanio. Ĉefe el vulkanaj rokaĵoj konsistas, la **insulo-Sado** (Sado 857 km<sup>2</sup>) konata iam pri sia orminiado, situanta laŭ la okcidenta bordo.

De la Fuji sudoriente situanta **Hakone** iam, antaŭ 200 000 jaroj, povis esti proksimume duongranda vulkano, ol nun la Fuji. Tiam sekve de ĝia detonacia eksplodo, ĝis kratero ĝi enŝiriĝis. Poste la ĉirkaŭ de 30 000-50 000 jaroj el la kaldero elleviĝanta nova, pli malgranda vulkano ekhavis sian saman sorton. Hodiaŭ de la du kalderoj, situantaj pladforme unu en la alia, elleviĝas sep junaj vulkankunusoj kaj lafkupoloj, la plej alta estas 1438 metrojn alta. La movadon de la pli malnova 10 km diametra kaldero bone signas la duonlunforma **lago-Ashino** (Aŝino). Ĉirkaŭaĵo de la Hakone estas unu el la plej riĉa teritorio de Japanio pri ariervulkanaj fenomenoj.

La agema zono daŭriĝas sur la malvasta **duoninsulo-Izu** kaj la pli sudaj insuloj **Ogasawara** (Ogasavara, **alinome Bonin**). Ĉiuj membroj de „**la sep insuloj de Izu**”, havante ĉirkaŭe 300 km<sup>2</sup> larĝan teritorion, **pli norda insulgrupo** estas esence unu vulkano, kies plimulto aktiva estas, plej konata estas la **insulo de O-shima** (O-ŝima), kies centra vulkano estas la 764 metra, Hawai-tipa **Mihara-yama** preskaŭ senpaŭze agadas.

En ĉirkaŭaĵo de la insuloj ne raras ankaŭ la submara vulkanismo. En 1952 tiel naskiĝis – distance de Tokio 420 km - unu 150 metrojn diametra, 30 metrojn alta malgranda insulo, la **Myozin-syo** (Mjozin-sjo), kiu dum la konstanta erupcio unuatempe daŭre kreskiĝis, sed post la malfortiĝo de la eksplodo, al insulon la marondado „forlavis.” Por esplori la eksterordinaran spektaklon pluraj esplorŝipoj navigis al la okazejo; sed tiam nova eksplodo sekvis, grandioza gas- kaj akvokolono elŝprucis en la aeron. Tiam ĵus super la kratero trapasanta unu esplor-ŝipo kun sep esploristoj kaj 22 membroj de maristaro malaperis en la kirliĝantaj ŝaŭmoj. Poste oni trovis profunde boriĝadante en la vrakoj; rokaĵ-pecojn devenantajn el la eksplodo. Post unu jaro la eksplodo silentiĝis, sed ĝia agado ankaŭ de tiam ek-renoviĝas, vekante konstantan cunamo-danĝeron. (Geografio de Azio, Aŭstralio kaj

Oceanio.- La hungarlingvan tekston redaktis: Ferenc Próbáld – Gergely Horváth, ELTE Eldonejo Eötvös – Budapeŝto, 1998) © 1999-2005 BEBTE www.bebte.hu

„Post unu semajna forta aktivado, la japana vulkano **Sinmoedake** ne montras signojn de la silentiĝo. La vulkanon Sinmoedake ĉirkaŭas la ceteraj formacioj de **Kirisima vulkana kampo** – inter aliaj nordoriente unu glacikovrita kraterlago. /04.februaro 2011.15:48. Híradó.hu/”Harmo Net/ Japanio konsistas 3900 insuloj, sur la renkonta linio de terkrustaj platoj. Ĉi tio kaŭzas la nekalkuleblajn malgrandajn-grandajn termovojn kaj la fortan vulkanan agadon. **Japanujo havas 36 aktivajn vulkanojn.** Inter ĝiaj dormantaj vulkanoj, la 3776 metrojn alta Fuji estas la plej granda. La estimata „sankta-monto” estas pilgrimejo de la sintoistoj kaj budhistoj. Ĉiuj Japanoj en sia vivo unufoje grimpas la **monton Fuji**, por ke de la pinto ili rigardu la admirindan sunleviĝon, estiĝintan simbolon de la lando. Japanio disponas per milopo da termalakvo-fontoj.”

## Fotoj de vulkanoj

Mt. Fuzi



Mt. Sakurazima




Mt. Aso



## Fotoj de varmaj fontoj



## Vulkana mapo de Japanio



„ La tertremo estis tiom granda, ke tuta Japanio 2,4 metrojn forŝoviĝis, kaj ankaŭ la terakso iĝis pli fora dek centimetrojn. La plej granda japana insulo de nun estas serĉebla per 2,4 metroj pli fore. La formoviĝon de la bordoj oni povas bone vidi sur la satelitbildoj faritaj de urbo Sendai proksime de la epicentro. Pere la debaskulo de revoluaĵo la tag-longoj mallongiĝis pri nerimarkebla mezuro. / Fonto de la hungarlingva teksto: HÍR: Kibillent a Föld tengelye”/Novaĵo: Debaskulo de revoluaĵo de la Tero./

Nun okaze de la tertremoj kaj cunamo kiam mi ekvidis mapon pri la malnovaj kaj nunaj vulkanoj de Japanio, venis penso en mian kapon, ke eble surterte ne estas alia lando kiu povas havi tiom da vulkanoj ol Japanio. Neniu alia lando povas paroli pri tio, ke el siaj eksaj vulkanoj ankaŭ pluraj povos funkcii iam-ajn, kaj tiam la pli granda parto de la loĝantaro estos pereige dandĝerigota. Povas esti, ke mi ne solas pri miaj pensoj ankaŭ tiuteme, ke en tiu

vulkansfero 16 atomreaktorojn havi estas tro danĝera. Kaj ankaŭ aliuloj konsentos kun mi, ke pro la ne-malkalkulebleco de la naturo la dufoja ĵeto de atombombo sur Japanion, de la grandpotencaj ŝtatoj, finitaj atombombo-eksplozaj espoloroj subteraj, aeraj, submaraj povis vekti la dormantan drakon, ili povis ekirigi la ĉen-reakcion de termovoj, kiuj kondukis al plifortiĝoj de la termovoj kaj eble ankaŭ al la fortiĝadanta procezo de la klimat-ŝanĝiĝo... Mi estimas la Japanan-popolon, kiu post la dufoja atomatako povis tiel grandmezure renovigi sin per eternan lukton daŭrigante por sia ĉiutaga vivo.

Sinjorino Adri Pásztor

## Leterkesto

### Solidareco al Japanio

„Karaj Gesamideanoj!

Ni, el Legio de Bona Volo (LBV) invitas Vin legi la artikolon de la verkisto, ĵurnalisto kaj edukanto José de Paiva Netto je solidareco al la popolo de Japanio. Vi aliras ĝin per la jena ligilo: <http://www.paivanetto.com.br/index.php/esp/artigo?cm=89867&cs=100>

Ni, en LBV, restas preĝante favore al kuraĝigo de la japanoj dum ĉi tiu malfacila periodo.

Kun bondeziroj, frate korsalutas Vin; Maria Aparecida da Silva

Respondeculino de la Departemento pri Esperanto de LBV, Brazilio

### „Estona Interlingvistika Asocio

...En lastaj jaroj okazis en la Tartua Universitato du gravaj konferencoj pri interlingvistiko kaj eŭrolingvistiko kun kontribuadoj de sciencistoj el multaj landoj. Ĉar la konferencaj kontribuadoj publikiĝas libroforme en la konata universitata serio "Interlinguistica Tartuensis", kies aktuala numero haveblas jam dum la konferenco mem, la partoprenantoj ne nepre devis aperi persone. Tio ebligis, ekzemple, kontribuon de interlingvistikoj el Ĉinio kaj okcidenta Eŭropo.

En oktobro 2011 okazos en Tartu lingvistika konferenco kun du sekcioj, slavistiko kaj interlingvistiko. La konferenco estas omaĝota al la 70-jariĝo de Aleksandr Dulichenko, aŭtoro de la baza interlingvistika bibliografia verko "Internaciaj helplingvoj" (1990). Li estas emerita profesoro de Tartua Universitato kaj honora doktoro de Trieria Universitato (Germanio), prelegadas daŭre en eŭropaj universitatoj kaj verkas fundamentajn librojn pri slavistiko. Bv. informiĝi kaj plu informi pri la oktobra konferenco, kie akceptiĝas esplorkontribuadoj pri ajna interlingvistika temo. Ili aperos en "Interlinguistica Tartuensis X, 2011". Kiel dum la antaŭaj konferencoj, la alveno de raportontoj al Tartu estas libervola, pli gravas la verkoj mem. Por detaloj bv. kontakti: Madis Linnamägi Estona Interlingvistika Asocio: [madis@forselius.ee](mailto:madis@forselius.ee)

## **Esperanto-Katedro**

„Saluton:

Plezure ni anoncas ke oni sukcesis krei Esperantan katedron en la Universitato de La Plata (Bonaero - Argentino). La inaŭguro de la Katedro "Esperanto kaj sia kulturo" okazis la 18-an de Marto en la salonoj de la Rektorejo.”/Salutadreso estas: Al la organizintoj: Edgardo Chacon [edgardomuseo@yahoo.com.ar](mailto:edgardomuseo@yahoo.com.ar), al Javier Valli: [izatasun@gmail.com](mailto:izatasun@gmail.com), kaj al Silvia Rottenberg: prezidantino de AEL Argentina E-Ligo/

Aloísio Sartorato [ludoviko44@yahoo.com.br](mailto:ludoviko44@yahoo.com.br)”

## **„Internacia Esperanto-Tago**

Esperanto ‘Twitter’ Tago okazos je la 26a de julio, la datreveno de la lanĉigo de la “Unua Libro”. Ni esperas ke vi povos partopreni – se jes bonvole pepu je tiu tago, kaj marku per #Esperanto. La celo estas antaŭenigi Esperanton reklamcele. Detaloj jenas ĉi-tie: <http://www.facebook.com/event.php?eid=207181359294030>

Esperable iuj el Hungario povos partopreni. Bonvole ankaŭ informu viajn alilandajn amikojn! Brian Barker [internacia.esperanto.agado@gmail.com](mailto:internacia.esperanto.agado@gmail.com)”

## **44-a Internacia Esperanto–Feriado**

Silezia Esperanto-Asocio (str. Dubois 3 /1, 50-208 Wrocław, Pollando), invitas al la 44-a Internacia Esperanto–Feriado kaj la samtempa 2-a Filma Esperantista Feriado, kiuj okazos de la 6-a ĝis la 14-a de aŭgusto 2011. Interesiĝu ĉe: [vroclavo@poczta.onet.pl](mailto:vroclavo@poczta.onet.pl) aŭ [pomer@wp.pl](mailto:pomer@wp.pl)

s-ino Adri Pásztor

## **Aŭstralio-Novzelando**

„Dum la lastaj monatoj Aŭstralio kaj Nov-Zelando suferis terurajn naturajn katastrofojn. Kvinslando kaj Viktorio ricevis pluvegojn kaj estis inundataj. Krom tio Kvinslandon ankaŭ fortega tropika ciklono damaĝis. Laŭ la Toowoomba Tereno neniu kvinslanda esperantisto perdis sian domon aŭ vivon, sed la inundo ja tuŝis la vivojn de multaj. Inter aliaj la familio de nia prezidantino, Diano suferis grandan perdon. La plej serioza kataklismo okazis en Nov-Zelando. La belegan urbon, Christchurch detruis monstra tertremo. Meze de marto mi vojaĝis al Rotorua dum longa viktoria semajnfino. Multaj nov-zelandanoj kun kiuj mi parolis en Wellington, Rotorua kaj Auckland dubis ĉu Christchurch estos rekonstruita. Multaj el niaj internaciaj esperantistaj amikoj sendis siajn mesaĝojn de bedaŭro kaj maltrankviliĝo el ĉiuj anguloj de nia tero. Koran dankon pro iliaj simpatiaj vortoj.”/Sándor Monostori - ★- el la retrevuo ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO, n-ro Marto 2011a/

## Gratuloj

Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos” gratulas pliajn sukcesojn dezirante: al la Estona Interlingvistika Asocio, al la Esperantlingva Katedro en Argentino kaj al la revuo La Ondo de Esperanto pro sia duobla jubileo (20 jariĝo kaj la 200a numero). Bonvolu ankaŭ vi saluti ilin.

## Helpo-peto

„Elstaraj Esperantistoj bezonas nian helpon. Halina Gorecka kaj Aleksander Korjenkov estas en malfacila situacio kaj mi petas vin legi kaj disvastigi la koncernajn informojn. Krom la menciitaj eblecoj helpi bv. atenti ke ankaŭ eblas sendi monkontribuon al la fondaĵo Mondo. En tiu kazo vi ricevus donackvitancon. **La koncerna konto:**

**Konto-Nummer 151 100 004 bei der Stuttgarter Volksbank, Bankleitzahl:**

**600 901 00, Menciu: Helpo Sezonoj**

\*Artikolo en la aprila eldono de La Ondo (resumo)\* Post la aperigo de la redakcia kolumno en la marta Ondo kortuŝajn leterojn. Ni kore dankas al "ĉiuj, kiuj sendis sandezirojn kaj esprimis sian pretecon subteni nin en la nuna tre malfacila situacio. Denove ni vidas, ke amikeco kaj solidareco en Esperantujo estas pli ol vortoj--- ili estas ecoj de la adeptoj de la internacia lingvo. Kelkaj amikoj (ekzemple, Sergej Bronov, kies leteron vi povas legi en la 9a paĝo) decidis ne atendi kaj tuj subteni nin; sed pli multaj demandis pri la manieroj, en kiuj oni povas helpi al Halina transvivi en Moskvo dum la atendado de operacio. Oni povas helpi multmaniere. Ni mencias kelkajn. Se vi, via klubo, aŭ via asocio eldonas informilon paperan aŭ/kaj retan, aperigu artikolon aŭ alvokon, por ke ankaŭ tiuj, kiuj ne legas, ne havu problemon. Rakontu pri ĝi ankaŭ en klubkunveno, en renkontiĝo. Uzu la pretan artikolon en nia retejo aŭ mem verku resumon de ĝi. Kontaktu bonfarajn fondaĵojn kaj mecenatojn, kiuj helpas neriĉajn personojn en krizaj situacioj, rakontu al ili pri nia kazo kaj petu helpon aŭ konsilojn pri helpo. Abonu aŭ aĉetu niajn librojn kaj instigu aliajn (ekzemple, la organizantojn de tradiciaj esperantistaj renkontiĝoj) mendi ilin en iu el la libroservoj aŭ rekte ĉe ni. Viaj abonoj kaj aĉetoj faros pli prospera nian etan entreprenon, el kies profito ni vivtenas nin dum dudek jaroj. Fariĝu dumviva abonanto. Kontraŭ 1000-eŭra kotizo vi ricevados ĝin tiom longe, kiom ĝi aperos. Kontribuu al nia savfonduso. Laŭ proksimuma takso, ni bezonas 20--26 mil Eŭrojn (la sumo dependas de la longeco de la restado en Moskvo). Ni mem disponas 6 mil Eŭrojn (jam 5 mil, ĉar unu monato pasis), do la mankanta sumo estas 14--20 mil Eŭroj. Viajn donacojn vi povas sendi al nia UEA-konto "gore-z" per la kutimaj pagmanieroj, klarigitaj. Dankon pro via subteno!

Aleksander Korĵenkov”

### **Bonvolu vidi la artikolon en la marta eldono de La Ondo:**

Tajponte ĉi tiun kolumnon, kies temo estas grava ŝango en nia vivo, mi subite konstatis, ke ĉiuj lastaj jardeko-komencaj jaroj (1981, 1991, 2001 kaj 2011) estis gravaj turnopunktoj sur nia vivovojo. En 1981 mi kaj Halina konatiĝis en la varmega Uzbekistano, kaj jam tiujare ni kune laboris en la legenda grupo LKS kaj en la Urala movado, kio baldaŭ rezultigis la kreon de la Urala Esperanto-Komitato, Kolektiva Esperanta Biblioteko, bulteno Ekzakte, sed, plej grave, ĉi tiu konatiĝo tute ŝanĝis niajn vivojn apartajn kaj kreis nian vivon komunan. En 1991, la plej lasta jaro de Sovetunio, ni entreprenis vojaĝon al Roterdamo kaj Antverpeno. Niaj konatiĝoj kun la agado (precipe, kun la redaktado kaj eldonado) de UEA kaj FEL, niaj interparoloj kun Simo Milojevic', Osmo Buller, Mark Fettes, Paul Peeraerts kaj kun aliaj profesiuloj, decidigis nin en tiu jaro forlasi niajn sekurajn oficejojn, tute ŝanĝi nian vivon, kaj ĵeti nin en la maron de la profesia vivo esperantista. En 2001, la unua jaro de la nova jarmilo, venis plia grava ŝanĝo. Post multaj jaroj en Uralo, ni forlasis ĝin kaj migris al la plej okcidenta regiono de Ruslando. Nova urbo, novaj homoj, novaj ideoj, novaj elanoj, novaj vojaĝoj, nova kunlaboro kun amikoj-partneroj en Pollando, Litovio kaj Germanio. Ni estas tre kontentaj pri la dek jaroj en la hejmeca kaj mild-klimata prusa lando. Sed komenciĝis nova jardeko, kaj en februaro 2011 ni havas plian ŝanĝon. Ni neniam publike skribis pri tio, sed ne plu eblas kaŝi, ke la sano de Halina, kiun unue ŝancelis la biologia katastrofo en Sverdlovsk (1979), tiel malprogresis, ke antaŭ kvar jaroj ŝiaj renoj ĉesis funkcii. Dum la lastaj kvar jaroj Halina subtenas la funkciadon de la organismo per ĉiutaga kvarfoja proceduro de peritonea dializado. Sed tio ne povas daŭri eterne. Necesas grefto de reno. Ĉar tiu operacio ne estas farebla en provinco, ni devis portempe forlasi Kaliningradon kaj ekloĝi en Moskvo atendante operacion. Ĉi tiu urbo-ŝanĝo metas nin en komplikitajn cirkonstancojn. Unue: pro la manko de la biblioteko, arkivo, aparataro k.s. preskaŭ ĉiuj niaj projektoj ekpaŭzas. Tio sentblas ankaŭ en La Ondo: ĉi-kajere mankas Nia trezoro kiun mi ne sukcesis verki sen niaj libroj. Ni petas vian komprenemon... Due: la atendado de la operacio kutime daŭras unu-du jarojn, sed la ŝparaĵoj de nia tuta vivo apenaŭ sufiĉos por ses-sep monatoj da loĝado en tre modest-kondiĉa loĝejo, kiun ni luis rande de Moskvo. Sen aldonaj enspezoj somerofine ni devos kapitulaci... Se iuj el vi -- kiuj dum jaroj legis niajn librojn kaj gazetojn, aŭskultis niajn podkastojn kaj prelegojn, partoprenis niajn renkontiĝojn, kursojn, konkursojn kaj ekskursojn, ĝuis koncertojn kaj ekspoziciojn kiujn ni organizis, uzis niajn bibliotekon kaj arkivon -- helpas al ni transvivi la nunan malfacilan periodon, ni estos tre dankaj al vi. Ĉar temas pri tute nova informo, ne rapidu -- pripensu dum unu monato, ĉu kaj kiel vi povos helpi, kaj en la venonta Ondo vi trovos pli da informoj pri la manieroj helpi.

Dankon pro via solidaremo! Aleksander Korĵenkov

Renato Corsetti - Via del Castello, 1 00036 Palestrina, Italujo - [renato.corse...@esperanto.it](mailto:renato.corse...@esperanto.it)

## **ILEI Kunsido kun lingvo de amo en lando de Hamleto**

En la jaro 2011 ILEI konferencos en Kopenhago, la semajnon antaŭ la UK, la 17- 23 julio, kun la tradiciaj kleriga, faka, organiza kaj kultura programoj, kaj, kiel ĉiam, kun io nova. Tiel la konferencanoj povos plani unuvojaĝe dusemajnan restadon dum la du eventoj por plene ĝui la riĉajn konferencan kaj kongresan programojn, kaj konatiĝi kun la kulturo de Danio kaj belaĵoj de ĝia ĉefurbo ...kaj aliaj vizitotaj lokoj.

/Dorotha Buchardt/

## **TEĴA, post la UK en Kopenhago**

Cetere, Audrys Antanaitis, prezidanto de TEĴA, intencas ĉi aŭtune okazigi en Litovio internacian ĵurnalistan konferencon pri la temo “Toleremo kaj ksenofobio” kaj kongrese pri ĝi informos al vi. Konkretan tagordon vi pogrupe ricevos retpoŝte en junio. Ĝin ni publikigos ankaŭ en nia retejo [www.teja.org](http://www.teja.org) Ĉar mi ne estas certa pri tio ke ĉiuj de vi antaŭe anoncitaj viaj e-adresoj validas, nepre notu rete la ricevon de ĉi tiu letero. Fartu vi ĉiuj bone!

Vytautas Ŝilas, ĝenerala sekretario de TEĴA - [litovastelo@takas.lt](mailto:litovastelo@takas.lt)

## **Karstaj Tagoj en Triesto – Italio, Printempa renkontiĝo: 2 junio – 5 junio 2011**

Triesto pavadas sian elegantan silueton inter la blanko de brila horizonto kaj la ĉiela kaj mara bluoj, lumturo altiranta vojaĝemulojn al ĉi nordorienta parto de Italujo. Ne nur la urbo tamen estas vidinda, sed ankaŭ ĝia ĉirkaŭa teritorio, la Karsto. Kaj ĝuste tiun ĉi ni deziras al vi prezenti: ni invitas vin al esplorado de Karsto, vi admiros ĝiajn plej sekretajn belaĵojn, flaros la parfumon de ĝia flaŭro, laŭiros padojn nekonatajn al „normalaj“ turistoj...Ni malkaŝos al vi eksterordinaran naturon, kies trezoroj mirigos vin!

Elda Doerfler [testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com) aŭ poŝte: Triesta Esperanto-Asocio – Via del Coroneo  
15 – IT-34133 Trieste – Italio ([esperantotrieste@yahoo.it](mailto:esperantotrieste@yahoo.it))

## Atenton!

La Tutlanda Fremdlingva Biblioteko en Budapeŝto petas la estimatajn biblioteko-uzantojn, ke la demandojn, petojn pri la esperantaĵoj bonvolu sendi al la nova esperantlingva fakreferento de la Kolektaĵo - Fajsz, al la bibliotekistino Anikó Nemes retadreso: [nemes.aniko@oik.hu](mailto:nemes.aniko@oik.hu)

Laŭ la peto de la reprezentantino de la OIK (Tutlanda Fremdlingva Biblioteko)  
H-1056. Budapest, strato Molnár 11,  
poŝtadreso: OIK, 1462 Budapest, Pf.: 469,  
retadreso: [igazgatosag@oik.hu](mailto:igazgatosag@oik.hu)  
retpago: [www.oik-hu](http://www.oik-hu)  
la cefdirektorino Tiborné Mender  
s-ino Adrienne Pásztor



## NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

*Tel.: + 36 70 206 1739*

*Tel.: + 36 70 570 8895*

*Tel.: +36 46 738 982*

Retpošto: [pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu](mailto:pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu)

Retpaço: <http://kiralylajos.uw.hu>